HUNGARA VIVO

4

1978

8 Ft

KOMPLEKSA VOJLARĜIGA MAŜINĈENO



Kompleksa vojlarĝiga maŝinĉeno, produktaĵo de firmo KÖZGÉP, enhavas du agregatojn, la vojrando-fosmaŝinon kaj material-kompaktigmaŝinon. Bazmaŝino de ambaŭ agregatoj estas unuaksa maŝino, lastatempe evoluigita, tipo VARUTA 41, al kiu estas alkroĉeblaj ankaŭ aliaj agregatoj. La unuopaj agregatoj estas ligitaj per artikoj al la bazmaŝino. La laborilo de la vojrando-fosagregato estas vertikalaksa, helica freziro, per hidraŭlika movilaro. Ellaboritan de la frezilo — materialon elŝutas ĵetŝovelilo. La kompaktig-agregato plenigas kaj kompaktigas en la frezitan vojrandon la cementan kaj bituman materialon, helpe de la materialakcepta funelo.

La agregatoj estas hidraŭlike leveblaj, malleveblaj kaj turneblaj.

La maŝinoj estas direktitaj per hidraŭlikaj artikoj.
Hidraŭlika movo estigas laborrapidecon 0—329,5 m/h, ŝanĝeblan inter ĉi tiuj limoj senŝtupe.



HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H—1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193 H—1368
Aperas dumonate
XVIII. jaro 1978. Nro 4 (80)

ENHAVO

Benczik, V.: Gyula Krúdy, la brua solulo 122
Krúdy, Gy.: La heroaĵo (D-ro I. *Nagy)* 124
Krúdy, Gy.: La leteroj de l' poŝtestro (K. *Bodó)* 126
Fejes, M.: Krúdy kaj Óbuda 128
Krúdy, Gy.: Sentimentala vojaĝo 130
V. B.: Sindbad 132
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo 4. 134
Radó, Gy.: BABEL kiu spitas Babelon! *(R-p-a)* 136
Gergely, M.: Portretoj de József Szalatnyay 139
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 140
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 143
F. E.: Kultura kalejdoskopo 144
Varga-Haszonits, Zs.: Kia estas Kubo? 145
D-ro László, F.: Renaskiĝo de la lago Velencei-tó (K. *Velősy)* 146
Örkény, I.: Antologieto de ŝercoj tra la hungara historio *(V. B.)* 152
Mihalkov, G.: Eminenta perfektiga lernolibro 155
Benczik, V.: Recenzoj 157
Nervi, M.: Trudherbo de espero 157
Kořinek, J.: Esceptoj en Esperanto 158
Krucenigmo 159
Leterkesto, Korespondi deziras 160

Sur la titolpaĝo: Sceno el la filmo Sindbad. (Foto: Hungarofilm)

Ni ne rezignis...

pri la specialaj numeroj, eĉ se lastatempe ni ne trovis temojn, al kiuj estus inde dediĉi preskaŭ duonon de la pliiĝinta amplekso de nia revuo. Nun, post kelktempa paŭzo denove sekvos almenaŭ tri tiaj numeroj: ĉifoje ni primemoras la verkiston Gyula Krúdy, kiu naskiĝis antaŭ cent jaroj, la 21-an de oktobro 1878. Ni devas konfesi: aperigante tiun ĉi numeron iom pli frue, ni vartas la revon, ke kelkaj eksterlandaj kluboj utiligos ĝin por fari malgrandan Krúdy-vesperon okaze de la jubileo. Se tiu nia revo ie realiĝos, ni volonte ricevos informon pri tio.

Nia sekva numero estos dediĉita al la 60-a datreveno de la hungara demokratia revolucio en la jaro 1918, nomata „revolucio kun asteroj", kaj fermos tiun ĉi unuan 240-paĝan jarkolekton en decembro speciala numero pri la Esperanta teatro.

Tiu ĉi numero estas esence literatura, tamen ni pensis ankaŭ pri la legantoj, kiuj trovos la rafinitan stilon de Krúdy malfacile penetrebla. Krom la serio pri la historio de Hungario aperas ankaŭ alia kontribuaĵo pri la sama temo: antologieto de ŝercoj, speco de „apokrifa historio" pri la periodo 1875—1975. Ni ne dubas, ke ĝi ridigos ankaŭ la plimulton de niaj legantoj, tiel same, kiel ĝi ridigis nin.

Meritas atenton ankaŭ la artikolo de György *Radó,* ĉefredaktoro de la revuo *Babel,* organo de FIT (Federacio Internacia de Tradukistoj). Estas al ni agrable akcepti tiel eminentan gaston sur niaj paĝoj, tiom pli, ke s-ro *Radó* jam delonge faras ĉion eblan por la popularigo de Esperanto en sia medio. Cetere, li esprimis sian pretecon aperigi kontribuaĵojn pri la problemoj de la esperanta tradukado en sia revuo.

Kiuj partoprenis la Festivalon en Havano — kaj ankaŭ tiuj, kiuj ne povis vojaĝi tien — certe volonte legos pri la temo *Kia estas Kubo?* Se jes, foliumu ĝis la paĝo 145. La eseeto *Esceptoj en Esperanto* de J. Kořinek verŝajne interesos ne nur lingvistojn.

Alvenis aŭtuno, kaj ankaŭ la tempo, kiam niaj perantoj — precipe ŝtataj gazet-importaj firmaoj — akceptas reabonojn por 1979. Ni esperas, ke malgraŭ la iom kaprica aperritmo ĉijare, ni ne perdis la fidon de niaj legantoj, kaj ili ĉiuj reabonos nian revuon. Eĉ, ni volus turni vin al ĉiuj: ĉu ne estus eble varbi nur *unu* novan abonanton por 1979?

Nia redakcio decidis malfermi malgrandan varb-konkurson. Por partopreni en ĝi vi bezonas varbi minimume unu novan abonanton (kiu ne abonis nian revuon dum 1977 kaj 1978), kaj sendi al ni la nomon kaj adreson de la varbito. (Kompreneble, ne forgesu sendi ankaŭ vian propran nomon kaj adreson!) Inter la varbintoj ni lotumos valorajn libropremiojn, kaj la nomojn de la plej sukcesaj varbintoj ni aperigos sur la paĝoj de HV. La limdato de la konkurso estas 1978-12-31. Varbintoj de pluraj novaj abonantoj partoprenos la lotumadon kun proporcie plurobla ŝanco. Do, ek al laboro!



Gyula Krúdy, la brua solulo

Gyula Krúdy (pron.: dju!la kru:!di) estas eble la plej soleca figuro de la hungara literaturo, malgraŭ tio, ke li ne vivis ermite: en la zenito de lia kariero kafejaj kaj bordelaj diboĉadoj, sukcesaj dueloj kaj bruaj skandaloj turnis al li la atenton eĉ de tiuj homoj, kiuj neniam foruzis tempon por legado de libroj.

Kvankam en malpli vasta rondo, famigis lian nomon ankaŭ liaj verkoj, almenaŭ en la unuaj jardekoj de nia jarcento. En tiu periodo li havas sukcesojn samtempe ĉe la kritiko kaj publiko, la eldonistoj vetkuras por liaj verkoj, kies melankolie ŝveba etoso klare apartigas lin de ĉiuj hungaraj verkistoj.

Li naskiĝis la 21-an de oktobro 1878 en la nord-orienta provinco Nyírség njí!:rŝe:g), eble la plej malriĉa regiono de Hungario, kiu post jaro, en 1879, donas al la lando palian grandan prozverkiston: Zsigmond *Móricz* (ĵi!gmond mo:!ric). Li devenas el malriĉiĝinta nobela familio: lia patro estas advokato, kiu ekstravagance edzinigas manlaboristinon.

INTER INFLUOJ

Krúdy havas nur dekses jarojn, kiam ĵurnalo en Debrecen invitas lin fariĝi konstanta kunlaboranto, kaj jam du jarojn poste ni renkontas lin en Budapeŝto. Lia unua libroforma verko — la novelaro *La nesto estas malplena* — aperas en 1897. Li laboras multege, kaj lia produkto estas konsterne granda: ĉiujare li eldonas 3—4 librojn, foje eĉ pli. Dum sia 35-jara kariero li verkis pli ol sesdek romanojn, preskaŭ trimil rakontojn, kvar teatraĵojn kaj nekalkuleble multajn felietonojn, artikolojn.

En siaj unuaj verkoj (*Juneco*, 1899; *Tristaj fabeloj de la gaja homo*, 1900) li sekvas la vojon de la hungara romantiko, precipe de Mór *Jókai* (jo:kai) kaj *Mikszáth* (mi!ksa:t). Poste vekiĝas en li certa — ne tre profunda — socikritika inklino, kaj oni sentas en kelkaj liaj verkoj (ĉefe en *La orminejo*, 1901) influon de *Zola*. Sed li ne povas plu iri tiun vojon, ja tio postulus de li konsekvencan kaj senindulgan elpaŝon kontraŭ sia propra socia klaso, la *ĝentrioj**.

Li trovas sian veran propran tonon ĉirkaŭ la jaro 1910. Li priskribas la dekadencan atmosferon de la jarcent-komenca Hungario, sed en liaj verkoj dominas ne socikritiko. Li volas kiel eble plej intime identiĝi kun la „herooj" de tiu mondo, kun la ĝentrioj, perdintaj ĉian perspektivon, vivantaj fakte en siaj rememoroj kaj sopiradoj. Tiu identiĝo ebligas al li majstre rekrei tiun ŝveban revomondon, kiun fakte ni povas koni nurnure el liaj verkoj: aliaj verkistoj (Mikszáth kaj Móricz) rigardis ĝin ĉiam supraĵe aŭ de ekstere, ĉu kun ioma simpatio, ĉu kruele vipante ĝin.

SINDBAD

La identiĝo baldaŭ kondukas al kreo de figuroj, en kiuj la verkisto fakte priskribas sin mem. Inter tiuj „samuloj" la plej komplekse kaj nuancriĉe prezentita karaktero estas sendube *Sindbad*, la aventurema naviganto de *Mil kaj unu noktoj*. Per la flugiloj de la fantazio Sindbad portas la legantojn al regionoj de la senlima interna mondo de la homo, kiujn neniu hungara verkisto antaŭ kaj post Krúdy sukcesis penetri. La du ĉefaj Sindbad-verkoj — *La junaĝo de Sindbad* (1911) kaj *La vojaĝoj de Sindbad* (1912) — ĝis nun restis unikaj pecoj de la hungara prozo.

Sindbad preferas la mondon de la provincaj nobeldomoj; la alia samulo, Kazimiro *Rezeda* vojaĝas tra Budapeŝto per *La*

* Per angladevena vorto oni nomis tiel la hungarajn nobelojn, kiuj sekve de la kapitalisma evoluo malriĉiĝis, kaj vivis parazitan vivon akaparante preskaŭ ĉiujn postenojn de la ŝtata administrado.

Fiakro, karakteriza figuro de la Budapeŝtaj stratoj en la tempo de Krúdy

ruĝa diliĝenco (1913). La ĉefa virto kaj valoro de tiuj verkoj estas la majstra envortigo de sopiraj rememoroj, flugemaj etosoj kaj bele-dolore tristaj plezuroj. Dum la jaroj de la mondmilito Krúdy daŭre priverkas en pluraj libroj la trovitan temon, por fuĝi antaŭ la kruele sanga realo. Al tiu ĉi periodo apartenas ankaŭ la verkoj *Premio de sinjorinoj* kaj *Kap-al-tere*, aperintaj en 1919.

LA REVOMONDO KREVIS

La revoluciaj eventoj en la jaroj 1918—1919 revekas en li la socian interesiĝon, kaj kun nedubebla simpatio li sekvas la disvolviĝon de la revolucio. Pro tio en la jaroj de la blanka teroro (1919—1921) li havas malagrablaĵojn ĉe la aŭtoritatoj. Krúdy denove perdas ĉian perspektivon, kaj la kruda socia realo senigas lin ankaŭ je la pli frue ame priskribita revomondo.

Dum la lasta jardeko de sia vivo li turnas sin al historiaj temoj. Liaj plej sukcesaj verkoj estas *Sep strigoj* (1922) kaj *Tri reĝoj* (1926—1930). En tiuj verkoj lia vidmaniero kaj stilo fariĝas pli realisma, sobra, sed ĝi ankaŭ perdas tiun aromon, kiu faris ĝin tute unika.

Li ne plu kapablas refariĝi populara verkisto, konstante premas lin financaj problemoj. La lastajn jarojn de sia vivo li pasigas jam en malriĉa loĝejo de la periferia urboparto Óbuda, kies atmosferon li ĉiam multe ŝatis, sed nun ĝi tamen fariĝis por li ankaŭ simbolo de karieraj malsukcesoj.

Li mortis la 12-an de majo 1933. La sorto zorgis, ke eĉ liaj lastaj tagoj ne estu trankvilaj. Pro nepago de la luprezo oni alvokas lin foriri el la loĝejo la 1-an de majo. La Elektrokompanio ĉesas liveri kurenton, la lastajn verkojn li surpaperigas ĉe kandellumo. La 11-an de majo — unu tagon antaŭ la morto — la registara ĉefo de la gazetaro vokas lin al si, kaj informas: Krúdy agis malinde al patrioto, verkante artikolon por hungarlingva gazeto, eldonita en la urbo Prago.

Ĉe lia entombigo estis reprezentita neniu oficiala instanco.

La socie orientita hungara literaturhistorio longe konsideris la verkaron de Krúdy duagrada ja Krúdy ne formas parton de la ĉefa, politikema fluo de la nacia literaturo. Nur dum la lasta jardeko oni komencis studi pli nuancite lian prozon, konsistantan el sorĉe kunfanditaj elementoj de revo kaj realo, pasinto kaj nuntempo, poezieco kaj vizioj, kaj oni trovis, ke ĝi estas unu el la plej suverenaj kreaĵoj de la hungara literaturo.

LI ANTICIPIS PROUST-ON

Per la rememoroj, tempo-manipulo — iasenca „melodiigo" de la tempo —, per la interna monologo kaj la enpenetro en la misterajn regionojn de la homa animo Krúdy sekvis la vojojn de la moderna Eŭropa prozo, kiujn hungaraj verkistoj povis suriri nek antaŭ li, nek post li. Certagrade li anticipis eĉ la akirojn de *Proust*. Parencas en la verkaro de Proust kaj Krúdy la nostalgio al la pasinteco, la lirika saturiteco, la aŭdacaj asociigoj kaj ankaŭ la ignoro de sociaj vidpunktoj; sed troviĝas ankaŭ diferencoj. Proust prilaboras vivmaterialon grandburĝan — la mondo prezentita de Krúdy estas esence feŭda. Dum Proust kreas konscie, ĉe li eĉ la pensĉifonoj de la rememorado havas strikte difinitan funkcion en la strukturo de la tuta verko, Krúdy verkas pli spontanee, lia prezentmaniero surhavas la stampon de la impresismo, kaj certagrade de la simbolismo.

La liberaj asociigoj, la libera manipulado per la tempo, kunfando de fantaziaj bildoj — ĉiujn ĉi metodojn de la moderna prozverkado hejmigis en la hungara literaturo Gyula Krúdy, malgraŭ tio, ke li ne estis ĉasanto de ekstravagancaj novaj manieroj. „Mi naskiĝis verkisto, nenio alia" — li skribis nelonge antaŭ la morto. Jes, li estis *nur* tio. Eble la plej granda hungara verkisto en la unua duono de nia jarcento.

Vilmos *Benczik*

Krúdy en la lastaj vivojaroj loĝis en malnova domo en Óbuda. — La verkisto babilante kun najbara metiisto

Gyula Krúdy

La heroaĵo

Estu permesate al mi rakonti la historion de la preĝema kapitano Stolniczky, kiu loĝis supre sur la montflanko, en malnova episkopa urbo, kaj li estis forta, kiel urso. En nia infanaĝo, en la tempoj jam delonge forpasintaj, ĉiudimanĉe ni vidis lin sencele iradi ĉirkaŭ la ŝtonsanktuloj, loĝantaj en la niĉoj. Ĉirkaŭ la antikva preĝejo troviĝis dekdu statuoj de sanktuloj, kaj Stolniczky al ĉiuj estis ligita per amikeco. Ĉiun dimanĉon frumatene li vizitis ilin, kaj kelkfoje eĉ post la posttagmeza litanio li estis ankoraŭ en la urbo. Ofte li diradis, ke lia unusola deziro estas stari kiel dektria inter la sanktuloj. Nur staradi en pluvo, en tempesto, vintre, somere en la mallarĝa niĉo, eble en eluzitan soldatan mantelon volviĝante, aŭskulti la siblegon de la vento, kiu similis kelkfoje al la sono de la orgeno ĉi tie en la ĉirkaŭaĵo de la katedralo, inter la kurbaj stratoj kaj malnovaj domoj de la kanonikoj.

Stolniczky ne estis ĉiam preĝema homo. La infanteria regimento, en kiu li militservis, ricevis komandon okupi Bosnion. Ĉio estis en ordo, ĝis la interbuĉado komenciĝis. Ie en la ĉirkaŭaĵo de Sarajevo, kapitano Stolniczky renkontiĝis survoje kun maljuna bosniano, kiu laŭte mallaŭdegis la fremdajn soldatojn kaj la imperiestron de la soldatoj. En ĉi tiu tago Stolniczky drinkis brandon, kion li neniam kutimis fari. La antaŭan tagon ĉe vojrando li enpaŝis ĝismaleole en la fluetantan sangon de mortigita malamiko. Vane li retiris tuj la piedon. Ĝi iĝis sanga.

Poste dumnokte senhalte flugis la kugloj el la direkto de la montflankoj, mallonge krakis la armiloj kaj flametoj ekfulmis en la mallumo.

Kapitano Stolniczky mortigis per unu glavopiko la sakrantan maljunulon. La pinta fero kvazaŭ senrimarke trapikis la gorĝon de la bosniano, kriego aŭdiĝis el la lipoj deformiĝintaj, kiun sufokis la elfluanta sango, kaj la maljuna vizaĝo esprimis neforgeseblan teruriĝon kaj riproĉon. La malĝojaj okuloj longe fiksiĝis sur la kapitanon kun profunda malĝojo. Stolniczky deturnis sian kapon kaj li ne kapablis sin returni dum li aŭdis la stertoradon.

Post la finiĝo de la militiro, li estis altigita al kapitana rango, sed vere li jam ne ĝojis pro tio. Li deziris trankvilon, li vidis sian glavon senĉese sanga kaj li teruriĝis, ligante ĝin ĉetalie; nokte li timvekiĝis el sonĝo: stertoradon li aŭdis el sub la lito. Li vere malsaniĝis kaj baldaŭ estis pensiumita, por kio li tiel sopiris.

Li havis nek familion, nek parencon. Iam li pasigis la posttagmezojn en malnova, malgranda kafejo de Buda. Li vojaĝis tien, kvazaŭ li irus hejmen. Sed en la malgranda kafejo dum la militiro, oni legis la ĵurnalojn kun duobla atento kaj la strangaj gastoj diskutis ne nur pri la daŭrigoj de la romanoj aperintaj en la ĵurnaloj, ili ĉiuj legis la heroaĵon de nia konato Stolniczky, kaj kiam li loksidiĝis ĉe la malnova angultableto, oni gratulis lin pro la mortigo de la maljuna bosniano.

Stolniczky timtremis. Nun li vidis, kiaj sovaĝaj bestoj estas la civiluloj, la sangverŝado trovas plaĉon ĉe ili. Li mortigis, sed ne por akiri gloron. Li estis ebria pro la brando kaj sango.

Rapide li forlasis la malgrandan kafejon por neniam plu enpaŝi tien.

En lia iama loĝejo, la filinoj de la dommastrino plenkreskis, fariĝis fraŭlinoj. Ili ĉirkaŭdancis kapitanon Stolniczky, sur kies genuoj antaŭ nelonge ili rajdis.

— La Bosnia heroo — ili kriis.

Vespere ili trenis lin al la Danub-borda korso, fanfaronante al konatoj kaj nekonatoj pri la kapitano, kiu mortigis multege da homoj dum la militiro.

Ĉe tagiĝo Stolniczky ĉion kunpakis kaj kvazaŭ fuĝe foriĝis el la amika, burĝa domo, kie li

plezure vivis ekde sia subleŭtenanta aĝo, ĉe la kresko de la infanoj, ĉe la printempo de la ĝardenoj de Buda, kaj vespere li muzikis aŭ legis romanon kune kun la familio.

En Buda li ne povis resti longtempe. Nekonataj burĝoj, kiujn li konis ĝis nun nur laŭvide, surstrate premadis lian manon.

— Brave vi kondutis, sinjoro kapitano. En la drinkejo, kie ankoraŭ neniu konis lin, iun tagon la mastro diris al sia edzino jenon:

— Roza, duoblan porcion el la fiŝsupo al la Bosnia leono!

Stolniczky honte metis ĉekole la buŝtukon kaj li ne revenis plu en la drinkejon. Vagadante sur solecaj, silentaj stratoj, kie lin neniu konis, kelkfoje li aŭdis stertoradon post sia dorso. La stertoradon de la agonianta maljuna bosniano. Ne, li ne povis resti plu en Buda. Li devas pentofari, li devas repaciĝi kun Dio, ĉar li mortigis tiun senkulpan kadukulon. La glorado far de la homoj kaŭzis doloron al li, ofendis kaj hontigis lin, ĉar en li interna voĉo konvinke kriis: Stolniczky, vi estas malkuraĝa krimulo!

Kie li estis, kien li ĵetiĝis ĝis li trafis en la malnovan episkopan urbon? Al neniu li rakontis pri tio. Sur la montflanko li trovis dometon kaj li ŝatis la antikvan preĝejon. Neniu konis lian paseon, oni tiel traktis lin, kiel laŭkutime la pensiumitajn oficirojn. Oni ne zorgis pri li, oni lasis lin en paco, la infanoj surstrate salutis lin.

Iun dimanĉon, irante en preĝejon, Stolniczky laŭiris serpentuman straton, kie li renkontiĝis kun terurmienaj rifuĝantoj.

— Rabia hundo! — oni kriis el ĉiu direkto, kaj la virinoj kun freneza malespero trenis kun si siajn infanojn. Kaj oni ektime fermis la pordegojn antaŭ la rifuĝantoj.

Kompatinda virino — vidvino de certa Kovács — kunportis siajn tri infanojn. La du malgrandajn ŝi tenis inter siaj brakoj, la tria, la kvinjara knabineto kuris de antaŭ la danĝero alkroĉante sin al la jupo de sia patrino. Ŝiaj etaj, nudaj, paŝetantaj piedoj, kun dolora rapideco tretis la pintajn ŝtonojn. La virino premis al sia brusto siajn etulinojn.

La knabineto abrupte delasis la patrinan jupon kaj falis sur la ŝtonoj. Kun ploranta ŝriko volis ekkapti ŝin la patrino, sed nun ŝi faligis la alian etulinon de sur sia brako.

Kaj en ĉi tiu momento aperis la rabia hundo. Ĝi estis sovaĝa vilaĝa hundo, kaj ĝi kuregis

Ornamaĵo super pordego sur malnova domo en Óbuda

furioze murmurante, kun levita vosto, kaj ŝaŭmanta buŝego, kiel neevitebla danĝero.

La hundo prenis direkton rekte al la veadantaj, surtere kuŝantaj infanoj kaj al la patrino freneze ŝrikanta.

Stolniczky tiam antaŭenpaŝis de apud la muro kaj per sia bastono batis la kapon de la hundo.

La besto retroiĝis, poste ĝi ĵetis sin sur Stolniczky-n.

La kapitano ege svingis sian bastonon. La hundo kun sovaĝa furiozo atakis, la bastono rompiĝis kaj tiam la kapitano ambaŭmane gorĝkaptis la hundon. Surteren preminte li sufokis ĝin, kvazaŭ ia admirinda forto kaj lerteco obsedus lin por defendi la infanojn.

Ekde ĉi tiu tago kapitano Stolniczky ne aŭdis plu stertoradon el sub la lito. Eĉ li konfesis al siaj novaj konatoj, ke li partoprenis en la Bosnia militiro.

Ĉirkaŭirante la sanktulojn de la malnova preĝejo, li jam elektis por si la dektrian niĉon, kie li starados. Herooj fartas bone inter sanktuloj.

El la hungara: D-ro István *Nagy*

Gyula Krúdy

La leteroj de l' poŝtestro

Mi venis en malgrandan vilaĝon, apud rapidflua montrivereto, antaŭ jaro vagadante inter montegoj kaj abiaroj. La grandaj landvojoj kaj la fervoja linio evitis la vilaĝeton, kaj eĉ la poŝto komunikiĝis nur ĉiun duan tagon. Eĉ tiel okazis ne malofte, ke la malgranda poŝtoĉaro revenis kun malplena sako: la vilaĝanoj ja ne tre havis interrilaton kun la ekstera mondo. La plej pasia korespondanto — kiel rakontis la maljuna poŝtestro — estis la fraŭlino instruistino. Sed ankaŭ ŝi sendis nur unufoje semajne la solvon de l' enigmoj al la ilustrita gazeto.

— Sed ne estis ĉiam tiel — diris la maljuna poŝtestro, kiu, kun la rondaj okulvitroj, kun la vasta hejmĉapo sur la kalva kapo kaj kun la longa pipo, aspektis kiel la plej multaj maljunaj vilaĝaj poŝtestroj. Mi opinias, ke tiu, kiu entreprenas vilaĝan poŝtestrecon, bezonas grandan porcion da anima harmonio. La teda monotoneco kaj senespereco de l' ofico supozigas, ke la maljuna poŝtestro ne plu atendas de la vivo ion eksterordinaran. La grandaj pasioj, sopiroj kaj ambicioj ĉe ili jam konsistas nur el la senkulpa scivolemo, per kiu la maljunaj poŝtestroj kutimas atenti pri la korespondado de la vilaĝanoj. En la vilaĝo tre malofte iu havas sekreton antaŭ ili kaj ankaŭ nia maljuna poŝtestro rimarkis kompateme, ke iam ankaŭ la fraŭlino instruistino pli multe korespondadis, havinte elektiton, brunan junulon kun malgrandaj lipharoj, sed li poste edzinigis la filinon de la instruisto en Léva, etan, ruĝan fraŭlinon, kiu havis pli multe da somermakuloj, ol ovo de meleagro . . .

Kiam mi esprimis mian miron pri lia informiteco, la maljuna poŝtestro trankvile ektiris la ŝultron kaj diris mallaŭte:

— Mi scias ankoraŭ multe pli, sed tion rakonti ja vere ne decus.

Vespere, kiam ni pipfumadis kune en la oficejo kaj la mure pendantaj oficialaj anoncoj, flaviĝintaj pro enuo, ŝajnis dormi, eĉ la valizo de l' poŝtisto kuŝis sur la tero kvazaŭ volante ripozi, iu ekfrapis la vitron de la verdkurtena oficejpordo.

— Jam pasis la oficialaj horoj! — kriis malafable la maljuna poŝtestro. Tamen li sin levis el la apogseĝo remburita per ĵurnalpapero kaj iris al la pordo. Li fortiris la kurtenon:

— Nu jen, fraŭlino Tina — li murmuris kaj malfermis la pordon.

Sur la sojlo staris blonda, mildokula, jam velkvizaĝa knabino. Ŝia duone sinjorina vestaĵo, la ĉebrusta antaŭtuko, kaj la puntotuko metita traŝultre, sed precipe la malkuraĝa, tamen scivola rigardo, kiun ŝi direktis al mi, fremdulo, konjektigis al mi, ke ŝi estas la instruistino. Iom da tempo ŝi staris hezite sur la sojlo, poste, preninte kuraĝon el la „nu, nu" de l' maljuna poŝtestro, ŝi tiris el sub sia antaŭtuko glufermitan leteron.

— Mi mem alportis ĝin, ĉar mankis al mi la marko — ŝi diris rapide, honteme, kaj poste ŝi rapide foriris.

La poŝtestro ŝerce kriis:

— Kaj la prezo de l' marko, fraŭlino Tina?

Sed la knabino jam ne aŭdis tion.

La malĵunulo gluis markon sur la leteron, stampis ĝin atente kaj poste rigardis ĝin murmurante:

— La poŝto devas krediti en la vilaĝo, se ĝi volas prosperi. Jam denove tiu Johano *Juhász!* Freneza estas nia fraŭlino! Kion ŝi volas de edziĝinta viro? Sed ja vere: kun kiu alia ŝi povus korespondadi?

Li residiĝis kaj prenis la leteron inter la fingrojn, rigardis ĝin atente tra la okulvitroj:

— Jen malgaja letero, sinjoro. Kelkajn ĝiajn literojn lavis varmegaj larmoj: ĝi konservas la ĝemojn de kompatinda, forlasita knabino, kies Dio, Savanto estis kaj estas eĉ nun Johano *Juhász,* kvankam, kiel mi diris, Johano *Juhász* jam estas edzo.

— Sed por kio ja korespondadas eĉ nun kun li la fraŭlino?

La maljuna poŝtestro ekĝemis:

— Tial, ĉar vi ne konas la vivon. Ni, poŝtistoj, konas ĝin. Se mortus Johano *Juhász* kaj estus jam sub la tero, dum iom da tempo eĉ tiam estus senditaj al li la leteroj, ĉar sen Johano *Juhász* nia kompatinda fraŭlino ne povus plu vivi.

La maljuna poŝtestro ŝtopadis sian pipon pli kaj pli malgaje kaj parolis mallaŭte, kompateme:

— Kiam mi estis juna, ankaŭ mi loĝis en la urbo kaj mi konis urbajn knabinojn. Ili estas tute aliaj, ol niaj vilaĝaj knabinoj. Se ĉesas ilia korespondo kun iu kavaliro, morgaŭ ili jam skribas al alia la samajn leterojn. Ĉar la amle-

teroj estas ĉiuj la samaj, kara sinjoro, mi scias, ĉar mi legis multajn, kiam mi estis juna. La poŝto tiam estis alia. Ni ofte devis atenti laŭ oficialaj ordonoj la korespondadon de kelkaj suspektindaj homoj... Do, mi legis ankaŭ multajn amleterojn — ĉiuj ili estas egalaj kvazaŭ folioj de arbo. La sola diferenco: ĉu viva, ĉu mortinta amo kondukis la manon de l' skribinto. Kaj kiom da mensogo, sinjoro! Neniu povas mensogi kiel la amanta homo. Sunbrilo, lunlumo, florodoro kaj parfumo estas en ĉiu amletero. Tiu homo, kiu junaĝe ne skribis amleterojn, ne scias, kio estas la feliĉo aŭ la malfeliĉo. La letero de la amanto alvenas: la maljunaj poŝtestroj estas la plej karaj homoj de la mondo. Sed se la letero malfruas, nebuliĝas la mondo. Kiom da tragedioj jam faris tiu letero, kiu perdiĝis en la poŝtkesto. La leterojn de la geamantoj aparte devus prizorgi la poŝto!

La maljunulo blovis grandan fumon al la flavaj tariftabeloj, kiuj, de iom da tempo, ŝajnis miri pro la longa parolo de ilia posedanto.

La nekuraceblaj geamantoj estas la plej bonaj klientoj de la poŝto... Jen estas mia fraŭlino Tina. Estas domaĝe pri la poŝtmarko, pri la vana laboro de l' poŝto. Johano *Juhász* ja neniam edzinigos nian fraŭlinon, tamen ŝi skribas, ja skribas la leterojn. Vere, ke iom pli malofte ol antaŭe, tamen ŝi skribas. Dekjara amo estis tiu ĉi amo, sinjoro, dum dek jaroj ili feliĉigis unu la alian kaj sopiris la feliĉon. Ĉiu letero iris tra mia mano. Mi konis ĉiujn iliajn pensojn, revojn, ĝemojn. Eĉ, se ili skribis amversojn unu al la alia, mi korektis ilin, ĉar, sen fanfarono, mi iam sciis iomete ankaŭ la versfaradon. Se mi trovis en la letero ian troan frenezaĵon, mi senceremonie forstrekis ĝin. La maljunulo ja devas havi pli da prudento ol la junaj. Mi bremsis, sinjoro, je mia honoro, mi bremsis, kiom estis eble kaj la du malfeliĉuloj tamen enamiĝis. Tiom ili amis unu la alian, ke tio jam preskaŭ doloris... Ĉar, sinjoro, ankaŭ en la maljunaj poŝtestroj ekzistas kelkfoje sento.

La maljuna poŝtestro enpensiĝis pro la estintaj memoraĵoj kaj ankaŭ la oficialaj anoncoj ĉirkaŭ li en la oficejo, la valizo de l' leterportisto en la angulo, ŝajnis enpensiĝi. Mallaŭte, revante li daŭrigis:

— La knabino estis pli malfeliĉa, ĉar ŝi oferis al tiu amo sian tutan vivon.

La vilaĝaj knabinoj estas aliaj ol la urbaj, se ili amas. Precipe tiuj forlasitaj orfoj, kiuj eĉ okazon ne havas ami pli ol unufoje.

Tiaj ordinare velkas, mortas pro la troa sopirado... Mi estas maljuna poŝtisto, sed mi skuis

Ilustraĵo de István Fejes

mian kapon pro tio, kion tiuj du geamantoj komencis skribadi.

Kelkfoje mi eĉ dormi ne povis pro tiuj leteroj, kvankam mi jam estas meze de la sesa jardeko.

Subite fulmo frapis ĉi tiun amon. Johano *Juhász* skribis leteron, ke li devas edziĝi al tiu meleagroovo, por ke li ricevu oficon... Mi longe pripensis, ĉu mi transdonu la leteron al fraŭlino Tina. Tiu letero estus ŝin mortiginta pli certe ol veneno. Neglektante la oficialan devon, mi defraŭdis la leteron.

— Kaj ĉu fraŭlino Tina eĉ nun ne scias, ke ŝia amato estas edzo? Kiel mi vidis, ankaŭ nun ŝi skribis leteron al li.

La maljuna poŝtestro ridetis melankolie:

— Jes, ŝi skribis leteron, sed ankaŭ tiu ĉi letero kuŝos ĉi tie, en la tirkesto, apud la ceteraj ne forsenditaj leteroj de fraŭlino Tina.

— Kaj la respondo je la letero?

— La respondon *mi* skribos, kiel kutime. Mi respondas en la nomo de Johano *Juhász,* kaj mi bremsas, ĉiam nur bremsas... Sed vane... Ofte mi sentas, kvazaŭ mi estus enamiĝinta. Mi ja ne povas lasi perei tiun ĉi knabinon.

Nun la maljunulo finis sian parolon, kaj la leteron de fraŭlino Tina metis senmalferme en la tirkeston.

— Ĉu vi ne legas la leteron? — mi demandis.

— Kial? — ridetis la maljuna homo. — Mi ja scias, kio estas en ĝi. Nokte mi skribos la respondon. Mi bremsas, sinjoro, ĉiam nur bremsas.

La sekvintan tagon mi forveturis el la malgranda vilaĝeto kaj mi ofte rememoras ridetante la maljunan poŝtestron: ĉu li skribas ankoraŭ la leterojn?

El la hungara: Karlo *Bodó*

Márton Fejes

Krúdy kaj Óbuda

— en la spegulo de faktoj kaj legendoj

Estante preskaŭ samaĝaj, Budapeŝto, kreita en la jaro 1873 per unuigo de ĝis tiam apartaj urboj: Pest, Buda kaj Óbuda; kaj la verkisto Gyula Krúdy, naskita kvin jarojn poste, baldaŭ trovis unu la alian, kaj iliaj nomoj fariĝis nedisigeble kunligitaj. Persistas ankaŭ asertoj pri intima inklino, prefero de la verkisto al la laste menciita urboparto: *Óbuda.*

Ĉu pravas tiuj asertoj, ĉu la loĝantoj de Óbuda rajte rigardas sia propra poeto Gyula Krúdy? Per kio Óbuda sukcesis ligi lin al si? Jen la demandoj, por kiuj mi serĉis respondon antaŭ ĉio en lia verkaro, tamen ne neglektante ankaŭ la certe ne senbazajn legendojn kaj anekdotojn.

Naskita en la centro de la orient-hungarlanda regiono *Nyírség,* la juna Krúdy post dekok jaroj, pasigitaj province, venas al la ĉefurbo. Plena de ambicioj, kaj neniam hezitanta konfesi, ke li venis por konkeri. Tamen, komence oni pli multe parolis pri lia vivo, ol pri liaj verkoj. Kvankam la juna ĵurnalisto kaj beletristo laboris senĉese en literatura kampo, komence li antaŭ ĉio nur *vivis* en Budapeŝto. La kutiman, la karakter-detruan, anim-venenan vivon de ĵurnalistoj, kaj malgraŭ tio, ke li rekonis koruptecon kaj senmoralecon, danĝeran al la korpa kaj spirita sano karakteron de tiu vivo, tamen li travivas ĝin, eĉ kelkfoje akrigante la situacion ĝis skandalaj diboĉoj, dueloj ktp. Tiele li vivis, sed antaŭ ĉio observis, por poste priskribi tiun vivon.

Li loĝas kelktempe preskaŭ en ĉiu urboparto, kaj baldaŭ ekkonas krom redaktejoj kaj teatroj ankaŭ kafejojn, drinkejojn, hipodromojn, salonojn de aristokratoj kaj de literaturemaj damoj same, kiel bordelojn kaj kartludejojn de flankstratoj.

Kaj la freŝe akiritaj ĉefurbaj impresoj, kaj ankaŭ la ĉefurbo mem komencas aperi en liaj verkoj kiel fono. Scenejo por la agado de lia romano *Orminejo* (1901) jam estas Budapeŝto, kaj ĝin sekvas pluraj verkoj, priskribantaj denove provincajn temojn. Nur en la antaŭmilita jaro aperas *La ruĝa diliĝenco,* kiu laŭ la intencoj de la aŭtoro mem celis esti ne malpli ol — laŭ la modelo de Thackeray — la Budapeŝta *Foiro.*

En tiu lasta verko jam palpeble senteblas la fono: pompo kaj mizero, ombroj kaj lumoj de Budapeŝto.

La „ruĝa diliĝenco" de Krúdy ofte veturas al Óbuda. Ni ankaŭ sidu en ĝi kaj kunveturu.



La urbo, komponita en la pejzaĝon, situanta inter la Danuba bordo kaj Buda-montoj, pro siaj geografiaj situo kaj natura beleco estas konstanta loĝloko jam de dumil jaroj. Pri tio aludas ankaŭ ĝia nomo: *Ó-buda* („Malnova Buda"). La iama centro de la romia provinco Suba Panonio estis preferata ankaŭ de la homoj de pli postaj epokoj.

Tamen prirabita kaj turmentita dum la turka okupado — ĝi preskaŭ senpopoliĝis. Por refunkciigi la normalan vivon kaj produktadon estis alvokitaj germanaj familioj, plejparte kamparanoj. La loĝantaro kulturas teron, precipe vinberojn sur montetoj, ekfloras ankaŭ vendado de vino, multiĝas drinkejoj, gastejoj, vinkeloj, kaj formiĝas merkato ankaŭ por aliaj agraraj varoj. Aldone al la tradicia brik-produktado, juna tekstilmetiisto, germano Goldberger

fondas fabrikon, kiu poste fariĝas bazo de la tuta enlanda tekstilindustrio; kaj komence de la Danuba vaporŝiptrafiko, ekfunkcias ankaŭ ŝipfabriko.

Aliĝante al la ĉefurbo, Óbuda fariĝas periferio, kaj — restas longe periferio ankaŭ laŭ figura senco. La perdo de aŭtonomio bremsis ĝian pluan evoluon (tute ĝis la nuna tempo, kiam Óbuda komencas fariĝi inda parto de la metropolo Budapeŝto, tamen konservante kiel eble plej multe el siaj ĉarmo kaj la tradicioj).

La barokan preĝejon kaj klasikisman kastelon ĉirkaŭas mallarĝaj stratoj, kun kadukiĝantaj domoj, kun same agoniantaj gastejetoj. Tie loĝas, aŭ tien alvenas la figuroj de Krúdy: senteatraj aktorinoj, sengazetaj ĵurnalistoj, etburĝoj, senlaboruloj kaj sentaŭguloj. Ili ĉiuj estas malriĉuloj, kaj tamen, milionuloj de tempo, kaj ĉiam io okazas al ili. Sed tamen nenio okazas, ili rakontas, fantazias, revas, sonĝas...

Malgraŭ sia malfavora ekonomia kaj financa stato, eĉ mizero, la loĝantoj de Óbuda estas gajaj homoj, ŝatantaj amuzojn. Ja en la familiaraj drinkejoj oni vendas bonan vinon, de sub la laŭboj de bier-kioskoj *ŝramli-muzikon** portas la vento, flugas la modaj kantoj *Seni Jager* kaj *Schöne Minka;* la plejparte germanlingva urboparto tamen havis ankaŭ hungaran teatron, kaj konstantan cirkon; dum foiroj kaj en angulo de la merkatplacoj ĵonglistoj, arlekenoj kaj akrobatoj amuzas la publikon...

La romantika vivo kunfandiĝas kun mistikemo: la aŭguristinoj kaj sorĉistinoj de Óbuda estas tuturbe konataj.

Eble ĝuste manko de la intensa kapitalisma evoluo kaj ties malbonaj akcesoraĵoj kaŭzis, ke en la epoko de Krúdy ŝvebas super Óbuda iu ĉarma provinceco, kvazaŭ vilaĝa idilio. Kaj dum varmegaj someraj vesperoj tie fartas bone kaj ekskursantaj aristokratoj, kaj indiĝenaj nenihavaj etburĝoj.

Sinjoroj Rezeda kaj Sindbad — tiuj du herooj de la verkisto, multe similaj al li mem — ŝatas Óbuda-n, ofte ili revenas tien, ĉu por viziti kutiman trinkejon, restoracion, ĉu por tramanĝi menukarton de iu geedza festeno, aŭ simple por ripozo kaj amuziĝo.

Ankaŭ la verkisto estis ofta gasto (kaj por la lastaj tri jaroj de sia vivo ankaŭ loĝanto) de Óbuda. Ju pli li enmerĝiĝas en la vivo de la brue evoluanta metropolo, des pli li sopiras al la ĉi-tiea medio, kie ofte li trovas rifuĝejon antaŭ financaj aŭ familiaj zorgoj.

El la trinkejoj li preferis tiun de mastro *Kéhli;* la gajaj vagabondoj, gastamaj, saĝaj kelneroj kaj ceteraj vizitantoj de Kéhli aperas ankaŭ en lia romano *Premio de sinjorinoj.* La familiara etoso de tiuj drinkejoj por multaj klientoj signifis hejmon, ripozejon, kaj por kelkaj verkistoj — kiel ankaŭ por Krúdy — metiejon.

La lastan vesperon antaŭ sia morto li gastis ĉe Kéhli, kaj portis hejmen botelon da vino, pri kiu li skribis, ke sufiĉas el ĝi tridek gutoj por iu ajn...

Faktoj, citaĵoj, pruveblaj

asertoj kaj indikoj miksiĝis en tiu ĉi artikolo kun legendoj (kiuj abunde svarmas pri Krúdy). Por iom kompletigi la bildon, staru ĉi tie fragmento el lia malfrua Sindbad-novelo.

„Sindbad ĵetiĝis al la bordoj de Óbuda (ĉe la insulo de l' ŝipfabriko) kiel ŝiprompulo, kiu ne havis eblon elekti la kielon de la rifuĝo. Lia barko likis en tempesto, puŝiĝis al roko, do li kaputis sur Danubo, sukcesis savi sole sian vivon el la batalo inter la elementoj, kie ĉiumomente li povus frakasiĝi... Savinta la nuran vivon, li ĝojis eĉ pri tio, ke la sandalojn li havis ankoraŭ surpiede...

— Ja ĉiam mi volis ripozi en la tombejo de Óbuda, se jam ne estis eble pasigi la tutan vivon en tiu ĉi tre estiminda urbo. Tie mi volas pagi imposton — diris Sindbad kun elkora konvinkiĝo, ĉar post la ŝiprompo ankaŭ li ne ŝparis piajn decidojn, pere de kiuj li petis gracon por resti plu viva."

Jen la citaĵo. Ĉu ĝi dubigas aŭ konfirmas la legendon pri lia speciala ligiĝo al Óbuda? — Ne gravas. Temas pri verkisto de eble mondliteratura signifo, iniciatinto de moderna literatura tendenco en la hungara literaturo, kaj pro tio estas interesaj pri li ĉiuj detaloj, eĉ ŝajnaj bagatelaĵoj.

---

* Muziko de popoleca orkestro, konsistanta el du violonoj, klarineto, gitaro, citro kaj harmoniko. (Laŭ la nomo de *Schrammel,* Viena muzikisto.)

Gyula Krúdy:

Sentimentala vojaĝo

Sindbad en sonĝo ekaŭdis strangan bruon. Terbuloj tamburantaj sur ĉerko, tion similis la bruo. Kvankam ankaŭ nun, kiel ordinare, li sonĝis pri virinoj kun velkemaj ŝultroj kiuj iam por li brilis, pri junvirinaj maleoloj, pri hararoj viditaj de li ie-tie sur virinaj kapoj. La stranga tamburado vekis lin, kaj li levis la kapon de sur la kuseno, kredante, ke jen, plenumiĝas la morto. Ĉar laŭ lia imago, la morto — tiel konfesis ĉarlatano kaj rakontis divenistino — surprizatakos lin. Kvazaŭ gasto alvenanta de tre malproksima loko, la morto subite enpuŝos la pordon. Aŭ sur la longa promenejo aŭ en la vortico de la grandurbaj stratoj venos lin renkonte iu kiun eblos rekoni inter mil aliaj. Fremda viro, kun malagrabla, demona vizaĝo, penetranta, malica rigardo jam de malproksime observanta Sindbadon: la morto. Ili ĉiam pli proksimiĝos unu al la alia. Langvoriĝos la Sindbadaj genuoj, jam nur pro malkuraĝo li plumarŝos, se tamen estus evitebla la misvola fremdulo. Lia kapo turniĝis kaj forte li fermis la okulojn, haltigis la spiradon. Ĉi nevidebla kapturno, kiu foj-foje surprizis lin, kvazaŭ papilireto estus ĵetita sur lian kapon, tiel ke li forgesis preskaŭ sian tutan vivon. Alkroĉiĝis li al la apudvojaj arboj; ĉirkaŭe fremdaj, indiferentaj vizaĝoj kvazaŭ li rigardadus tra fenestroj en rapidtrajnon glitantan en la transmondon. Samtiel se subite li fariĝus nevidebla por ĉiuj; virinoj, hieraŭ ankoraŭ rigardintaj en liajn okulojn kaj lasintaj senĝene en la profundo de siaj okuloj ekbruliĝon de nokta fajro en kampa fundo, kaj kiuj ne kaŝis la lipojn, la buŝon, kiam Sindbad fikse alrigardis ilin; viroj kun vakaj rigardoj, kiujn Sindbad ĝenerale malestimis ĉar la virojn ĝenerale, li ne respektis de kiam li subaŭskultis, finstudis ilin, iliajn tristajn pasiojn, sinhumiligajn dezirojn, malpardoneblajn amajn erarvojojn: ĉiu el ili kun mieno indiferenta preteriras lin, dume ke li, obtuze narkotika, kvazaŭ fiŝo ĵetita sur bordon, alkroĉiĝis al strata lanterno. Kelkfoje forpasis minutoj ĝis post la peziga sveno de la morto li retrovis la realaĵon de l'vivo, eluzinte ĉiuj siajn energiojn; antaŭ la okuloj malaperis la griza vualo simila al koloroj rekoneblaj sur flanktabuloj de elfositaj ĉerkoj, li enspiris profunde, „tiel mi mortos iam", pensis li en si kaj antaŭeniris almenaŭ dekduon da paŝoj ĝis ekatenti pri lumanta miozota okulparo sub printempa florŝarĝita ĉapeleto. „Korparalizo", li diris poste, laŭte, en sia interno kvazaŭ grimacante pri la evitita malamiko — neniu venis lin renkonte kun malbonvola, kruelema vizaĝo, sed kelkaj brunaj damoj paŝadis trankvile en la proksimo, amikeme, kun humilo karakteriza al virinoj ankoraŭ nespertaj. „Certe, pri neniu mi pensis — tiun posttagmezon" — diris en si Sindbad, sin prezentinta vespere en la Operejo, kiam la komika dirigento iome ĉesigis la muzikadon. La morton li konsideris kiel klabobaton, kiu surprizos lin eble en la brakoj de l'amatino. Okazu tio almenaŭ apud lago aŭ profundakva rivero, kie tuj eblas enteriĝi. — Kaj noktomeze, kiam, sidetanta solece en sia ĉambro, la favoratai legaĵoj, poemlibro aŭ melankolia romano, defalis el inter la manoj, li ekmeditadis, kia malagrabla situacio falus sur li, se ĉe lia enterigo diversaj virinoj renkontiĝus unu kun la alia. Tamen verŝajnas, ke plejmulto de la konatinoj nur de malproksime rigardus la ceremonion, kvazaŭ neniel koncernus ilin la mortinto. Malantaŭ la ĉerko ploregus nur unu-du naivaj, trompitaj virinoj, pri kiuj cetere neniam zorgis en sia vivo Sindbad, la naviganto. — Sed Sindbad ankoraŭ ne estas mortinta, kvankam la stranga ĉerkobruado eĉ tiam eĥis en la oreloj, kiam li ĝisfunde ĉirkaŭrigardis en la ĉambro kaj rekonis la meblojn. Tie sur la muro la portreto, de knabineto mortinta, fotografiita en la katafalko, ŝiaj duonfermitaj okuloj en la ronda, minca orkadro, kvazaŭ ili rigardadus en transmonda trankvilo. Ĉi tie damo oleopentrita ĝistalie, ŝia staturo digna je reĝino Elizabeta, revema hungara popolkanto flugetadas ĉirkaŭ ŝia bruna hararo. Mediteme palpebrumas sur la muro feino, kiun Sindbad neniam konis, tamen li pensis, ke la damo iam vizitos lin kiam li estos for de la hejmo, ŝi deprenos la gantojn, liberigos la manojn el la zibela peltaĵo, kaj per la blua inko ŝi skribos kelkajn liniojn sur blanka papero kuŝanta sur la tablo, sekigonte la vortojn per orpolvo: Ĉi tie ŝi estis kaj senfine bedaŭras, ke la renkontiĝo estas malsukcesinta... Ne ekzistas viro kiu ne atendus, ke foje iam alvenos la plej bona, plej ĉarma virino kiun li konas nur en la fantazio... pri kiu li pensas ekde la infanaĝo kaj eblas, ke ili ne povas renkontiĝi en ĉi vivo nur tial, ĉar la fraŭlino estas dancistino en Sevilo aŭ tatara princino en la Kaŭkazo... aŭ ŝi fariĝis jam maljunulino, antaŭlonge, kiu el la kartoj ekscias mirege ke kavaliro destinatas por ŝi, vane ŝi miksas kaj levas superstiĉe la paketon... aŭ eble ŝi kuradas en la promenejo kiel mallongjupa knabineto, kies guvernistino estas enamiĝinta je Károly Kisfaludy*... por momento ŝi videblas malaperanta

tra la vitroj de galopanta kaleŝo... aŭ ŝi venas ĉe tagiĝo el la suburboj kaj disdonas la tagĵurnalon sur etaĝoj de dormantaj domoj... Kiu kapablus scii, kie, kien iradas la virino sur kies lipoj aŭdeblus tiu stranga voĉo, en la sonorado de kies voĉo enestus vivo kaj morto. Kaj neniam iu el la sonĝoj alvenas. Ĉar sonĝi eĉ ne indus, se la sonĝoj realiĝus.

Estis tiam printempo, kaj Sindbad, kiel ordinare, kontemplis la kuregantan riveron, li kubutumis sur la ponto, kaj kiel eminenta lernanto, li pensis pri la urboj, vilaĝoj, montaroj, kiujn la riverŝaŭmoj preterkuros poste ke ili malaperos antaŭ lia rigardo; estis la apudbordaj pejzaĝoj, kiujn li vidis, kovritaj de sunbrila vaporo, aŭ ĉe nokta kampadfajro fiŝistoj tiras la remilojn, kaj sur la bordo marŝadas sinkuraĝiga, meditema knabino, kun infano sub la koro; poste, sangokulaj viroj subakviĝas en la ondoj, kun ekscititaj vizaĝoj, kaj en apudrivera vilaĝeto la riverego flankenglitigas sur la la sablon la taŭzvizaĝan kavaliron, kiam en la riverega mezfluo, je vesperiĝo akompanate de gitarvibrado kaj sonora, kopulanta baritono, per sia malvigla korpo vekante ondojn, pluflosas ĝis Mohács la vaporŝipo. Tie kuŝas la mortinto de la rivero sur la bordo kun deformita rigardo fiksanta la stelojn kiujn samtempe tuŝas ankaŭ radioj de aliaj okuloj. Malvorta ekvido suprenfluganta de la sablo parolas al la Hundo kaj la Granda Urso eble pri la sama virino, kiu nun reve promenadas sur la ferdeko brak' en brako kun sia amanto kaj ili serĉas en la ĉielalteco stelon, kiu gardas iliajn paŝojn, al kiu ili ekĝemas nokte en la fenestro, al kiu ili adresas siajn ĵuradojn. Kaj la virinoj kiuj naĝas kune kun la viroj en la riverego, en la profundaj akvoj aŭ foj-foje leviĝantaj ĝis la akvonivelo, preternaĝas konatajn urbojn kie eble iam ili sidadis feliĉaj en la kafejoj, malantaŭ la vanilkoloraj kurtenoj ili pensis pri tiuj strangaj vortoj, kiujn ili kvazaŭ la unuan fojon estus aŭdintaj sur virinaj lipoj — aŭ pri la promenejo, kie la kavaliro konfesis, ke li venis en la urbon nur por malfeliĉigi sian vivon, ĉar ekde nun la estonto montriĝas pura sufero... Kaj nun ili kune naĝas kvazaŭ silentemaj fiŝoj, kiuj mire alfrotas la nazojn al la koroj, okuloj, kvazaŭ demandante: de kie vi venas, kion vi sentis kaj kion vi vidis, antaŭ ol rifuĝi antaŭ la homaj okuloj en la riveregan malhelon? Ja propradire ĉiuj fuĝas la urbon por postlasi la malicgrimacajn, satanajn, kaŝobservajn, senanimajn ekrigardojn. Kaj sube ĉe la insula pinto, kie giras la riverego, kaj la trankvilaj ondoj konfuziĝas pri sia vojcelo, la viraj kaj virinaj kadavroj renkontas unu la alian, ili kuntuŝiĝas meze de la muĝa torento, kaj se ili apudiĝus sur la bordo, per kia kurioza rigardo esplorus ili unu la alian! Ha, ĉi tie jam neniu estas, kiu demandu: „pro kio?" Jam ili ne pensas eble eĉ pri tio, kio okazis hieraŭ, kion konsilis la kuseno, kion eldiris la lipoj, kiel mensogis la okuloj! Tie ĉi, sur la bordo, en la sablo kuŝadantaj ĝis la alveno de kamparanoj, kiuj esploros la poŝojn, kiel malnovaj veraj amikoj unu apud la alia silentemas la kadavroj. Hieraŭ la virino eble estis kasistino en la Jozefurbo,

Ilustraĵo de István Fejes

kaj pro ia soldato ŝi saltis en la Danubon, por iel atingi Zimony-an garnizonon. La viro priploras la amatinon, kiu en alian viran buŝon enkisas lastatempe siajn dirindaĵojn, kaj ŝi ne emas jam eĉ alveni la lastan renkonton en la hotelaĉo, kie kun revolvero en la mano atendas lin la kompatinda stulta viro... Kiom strange ili certe gapas unu la alian, ĉe la riverbordo!

Kaj tiun tagon nia heroo, Sindbad, aŭdanta la ĉerkobruon, supre de la rivero sur la ponto daŭre revadis pri sia amatino, kiu hieraŭ saltis en la Danubon.

— La bluan vualon mi survestos — skribis interalie la fraŭlino, en la adiaŭa letero.

Sindbad primeditis mallaŭte, ke nobla ago estus preventi la proksimiĝantan morton. Kion faris de tiam la fraŭlino en la Danubo, de kiam li ŝin ne vidis? Kion ŝi vidis, kion ŝi aŭdis de tiam, kiam lastfoje ŝi rakontadis al Sindbad sur la kuseno? Ŝi havus eble ĉarmajn dirindaĵojn, kiujn estus bone aŭskulti en duondormeto? Ha, kiom belajn historiojn diras la virinoj, kiam silentiĝis ilia amemo!

Sindbad ĉirkaŭrigardis.

Sola li estis sur la ponto.

Li descendis lante en la Danubon, por renkontiĝi kun la mortinta amatino, ie ĉe la insula pinto.

Kaj dumvoje eble li konatiĝos ankaŭ kun aliaj memmortigintaj virinoj.

Tradukis: Zsuzsa *Varga-Haszonits*

*Dande bela hungara verkisto (1788—1830)

SINDBAD

La mara vaganto de „Mil kaj unu noktoj" preskaŭ dektri jarcentojn post la heĝiro de la Profeto reenkarniĝis fore de l' maro, en lando, kie ĉiuj loĝantoj estis ŝiprompuloj, eĉ tiuj, kiuj neniam alfrontis la nekonatan bluan malproksimon.

Sindbad multe alsimiliĝis al la kvieta naturo de sia nova medio, tamen lia sango ek-ekpulsis, la koro ne povis longe toleri la tedan trivialon, ĝi sopiris por sentoj belaj, noblaj, animkaresaj. Lia kaleŝo ĉiam estis ir-preta, por malrapide sed persiste travagi la grize monotonan hungaran polvo-maron, postkurante tiujn belaĵojn, kiuj dolĉigis por li la sonĝojn dum la svene profundaj kaj longaj vintraj dormoj. Sindbad ofte sonĝis pri virinoj, plej volonte pri burĝonantaj junulinoj, puraj kaj naivaj... Sed la vivo jam instruis al li akcepti kompromisojn, kaj la grizeco de l' vintraj tagoj pri la kapablo ĝui ankaŭ sordinitajn plezurojn. Li aŭskultis volonte la sopirajn memorojn de iamaj belulinoj, dediĉante sin dum la rakontado al la palatotiklaj incitoj de majstre preparitaj supoj, rafinite spicitaj viandoj kaj superbaj saŭcoj.



Sindbad ne estis senpacienca: li ŝatis longe senti la guston de ĉio — manĝoj, trinkoj kaj virinoj.

Ĉiam obsedis lin la penso pri la morto, pri tiu plej granda, lasta vojaĝo. Eble pro tio vere altiris lin nur virinoj tristaj kaj maturaj, kies korpo kaj ĉeloj ankoraŭ ne perdis la ŝveligajn sukojn de l' vivo, sed jam spiris el ili la dolorige funebra incensodoro de l' forpaso. Amorante kun tiaj virinoj li havis la senton nupti bigamie kun vivo kaj morto.

Lin ravis ankaŭ misteraj kasteloj, en kiuj sub paŝoj de revenantaj spiritoj kaj fantomoj kraketis la lignoŝtuparoj ne nur nokte, sed ankaŭ dum plumbe grizaj aŭtunaj tagoj. Sindbad ofte pensis pri tio, kiel lia spirito revenados, kaj kiujn ĝi vizitos?

Kaj post multaj aventuroj, koninte mil tristajn virinojn kaj preskaŭ tiom da majstraj variantoj de l' orkolora buljono kun vermiĉeloj, tamen sen senti iam veran plenumiĝon, en iu korsufoka aŭtuna posttagmezo li ekiris la plej longan, senrevenan lastan vojaĝon. La griza hungara polvomaro restis sen naviganto.

V. B.

(Fotoj: Hungarofilm)

4. LA TATARA INVADO



Mongola invado en Eŭropo, en la 13-a jarcento

1. *Hungara reĝlando*
2. *Germana-romia imperio*
3. *Pola reĝlando*
4. *Germana kavalirordeno*
5. *Litovoj*
6. *Estonoj*
7. *Rusaj princlandoj*
8. *Kumanoj*
9. *Kartvela reĝlando*
10. *Bulgara reĝlando*
11. *Serba reĝlando*

La filo de Andreo la 2-a, *Béla* la 4-a, komencis diversmaniere repuŝi la feŭdan anarkion. Tiucele oni devis redukti la potencon de la baronoj, kaj restarigi la amplekson de la reĝaj grandbienoj, signife malpliiĝintaj pro la fordonacoj. Kompreneble, tiuj intencoj trovis fortan reziston flanke de la feŭdestroj, sed anstataŭ interbatali kun ili, la reĝo baldaŭ estis devigita koncentri ĉiun forton por savi la landon kontraŭ ekstera minaco.

La invado de la *mongoloj* al Eŭropo, direktitaj de ĥano *Ĝengis*, atingis en 1240 jam *Kievon*, kaj okupinte tiun grandurbon, la tatara kavalerio baldaŭ ekatakis Hungarlandon. La armeo, komandita de ĥano *Batu*, rapide penetris antaŭen, al la Granda Ebenaĵo. La hungara armeo alfrontis la tatarojn sur la stepo *Mohi*, ĉe bordoj de la rivero Sajó (ŝajo), kvankam sen multe da ŝancoj, haltigi la egan mongolan hordon.

Dum la batalo la tataroj sekvis la tradician taktikon de la Aziaj nomadaj triboj: ŝajnigante retiriĝon, ili igis la hungaran kavalerion disiĝi. En konvena tempo la tataroj returnis sin, kaj fermis en ringon la surprizitajn hungarojn. La batalo finiĝis, la hungara armeo estis disbatita. El la masakro, kvankam malfacile, la reĝo sukcesis fuĝi, sed el Vieno, poste el Zagreb li vane sendis alvokojn por helpo al la papo, kaj al la aliaj Eŭropaj monarkoj. Nek la papo, nek la germana imperiestro aŭ la franca reĝo atentis la petojn de la reĝo, kiu denove provis haltigi la tatarojn ĉe la Danubo. Sensukcese, ĉar la tataroj vintre trairis sur la glacikovrita riverego, kaj rapide okupis la tutan landon. La reĝo rifuĝis al Trogir (Dalmatio). Ne havante ŝipojn, la tataroj ne kapablis konkeri tiun urbon; la reĝo do estis savita, kaj baldaŭ ankaŭ la tuta lando. Ja en somero de 1242 mortis ĥano Ĝengis, kaj pro la heredaĵo komenciĝis konfliktoj en lia imperio: kaŭze de tio, Batu kun sia armeo forlasis Hungarlandon.

Restis tie la ruinoj kaj la malplenaj, senhomaj provincoj. Giganta tasko atendis la rehejmiĝantan reĝon: rekonstrui la landon kaj ekigi la vivon, kolekti la popolon. Béla ne plu luktis kontraŭ la potenco de la baronoj; eĉ male, li instigis ilin konstrui fortikaĵojn. Dum la tatara invado montriĝis, ke nur lokoj cirkaŭitaj de ŝtonmuroj kapablis kontraŭstari la atakojn de la nomadoj. Ankaŭ la reĝo mem igis konstrui multajn ŝton-fortikaĵojn por anstataŭi per ili la malfortajn, argilmure ĉirkaŭitajn defendejojn. Tiutempe estis konstruita la reĝa fortikaĵo de *Buda*, kiu ricevis urban rangon. Pere de metiistoj kaj komercistoj impete evoluis ankaŭ aliaj urboj de la lando. Post alvoko de Béla, amase enmigris germanaj, francaj, valonaj kamparanoj, kaj kiel al „gastoj", la reĝo donacis al iliaj komunumoj plurajn privilegiojn, i. a. elekteblecon de propraj magistratoj, kiuj zorgis pri kolekto de la impostoj por la reĝa trezorejo.

Dum la daŭra evoluado pliiĝis la potenco de la grandaj feŭdestoroj, kio denove minacis la etnobelojn, kiuj plejparte servis la reĝon, kiel oficiroj kaj militistoj: la grandbienuloj strebis engluti ties bienojn kaj tiel subigi ilin vasaloj. Por defendi sin, tiuj nobeloj plifortigis siajn departementojn (latine: comita-

La „granda sigelo" de reĝo Andreo la 2-a

La dua invado de mongoloj en Hungarion (Ilustrita Kroniko)

Sankta Margareta, filino de Béla la 4-a. (Ŝi estas ĉefrolanto en la romano de Géza Gárdonyi: La sklavoj de Dio.)

tus), kiujn subtenis ankaŭ la reĝo, ĉar ili prezentis kontraŭpezon, por repremi la potencon de la baronoj. Tiucele Béla eldonis dekreton en 1267, en kiu li ordonis, ke dum la ĉiujaraj sesioj de la reĝa juĝado, okazintaj en urbo Székesfehérvár, ĉiu departemento reprezentu sin per du-tri nobeloj.

En la lastaj jaroj de Béla la 4-a la konflikto inter li kaj lia filo dividis la landon. La grandaj feŭdestroj — utiligante tiun situacion, la malfortiĝon de la centra potenco — fariĝis veraj etreĝoj, kaj tiu feŭda anarkio daŭris plu ankaŭ dum la regado de la idoj de Béla. Vane intencis Andreo la 3-a (1290—1301) bazi sian potencon sur la departementoj kaj la landa asembleo de la nobeloj, ĉio frakasiĝis pro la potenco de la baronoj. Daŭre superregis plu la feŭda anarkio.

Andreo la 3-a estis la lasta filo de la dinastio de Árpád. Post lia morto rajton havis je la trono aliaj branĉoj de la dinastio, kaj la pretendantoj tiris la landon en civilaj militoj. Karlo-Roberto el la Napola dinastio de *Anjou* (anĵu) estis favorita de la papo. Tron-aspirantoj estis ankaŭ la ĉeha reĝo Vaclavo, kaj la bavara princo, *Otto.* Dum la longdaŭraj kolizioj ekestis ankaŭ kurioza situacio: la ambasadoro de la papo (nuncio) ekskomunikis el la eklezio la burĝojn de Buda, apogantojn de *Vaclavo,* sed tiuj, responde, pere de pastroj ekskomunikis la papon mem, kune kun Karlo-Roberto.



La unua konata hungara teksto, „La Primorta Prediko" (ĉ 1200.)

Finfine, kardinalo Gentile (ĝentile), nuncio de la papo, sukcesis kunigi grandan tendaron de feŭdestroj favore al Karlo-Roberto, kiu armile venkis kelkajn grandfeŭdulojn. En 1308 la landa asembleo fine elektis reĝo de Hungario, unuan el la dinastio de Anjou, *Karlo-Roberton.*

babel — kiu spitas Babelon

de György Radó



Idea fundamento kaj kuniga forto de FIT — Federacio Internacia de Tradukistoj (Fédération Internationale des Traducteurs) estas la konvinkiĝo: *ĉiu ajn lingva perado* servas interkomprenon de la popoloj kaj pere de tio la pacon. Tion faras kaj la *skriba* tradukado kaj la *buŝa* interpretado, tion faras la tradukado de *belliteraturaj* verkoj kaj same tiu de la *fakaj* tekstoj, ĉiu per sia metodo.

La esperantistoj precipe povas kompreni tiun ĉi konvinkiĝon kaj kunigan forton, ja ankaŭ ilian movadon kreis, subtenas kaj puŝas antaŭen simila konvinkiĝo kaj forto. Sed dum la bezono pri mondlingvo (eĉ se ĝi estas pli malnova) fariĝis realaĵo nur per la iniciato de *Zamenhof*, la lingva perado estas garantio pri kunvivado kaj paco de popoloj *ekde kiam entute ekzistas* diversaj idiomoj, t. e. ekde la pratempoj. Laŭ la Biblia bildo depost la Babela konfuzo de lingvoj. Tial, por pli akcenti la praan originon de la afero de tradukado, la internacia tradukista federacio donis nomon BABEL al sia revuo.

Ĉi tiun revuon mi deziras konigi al la legantaro de Hungara Vivo.

Babel estis fondita antaŭ 24 jaroj, kaj UNESKO, kiu ne ĉion protektas, tuj komprenis la internacian signifon de la afero de tradukado, kaj donis financan subtenon al la revuo. Ĝi ekde tiam ĝuas ĉi tiun subtenon, kiu jam helpis al ĝi venki plurajn malfacilaĵojn kaj ebligis ĝian senĉesan aperadon.

Babel servas duoblan celon. Unuflanke ĝi informas pri la plej novaj sukcesoj de esplorado en *problemoj teoriaj kaj praktikaj, havantaj rilatojn al tradukado.* Tial en ĝi regule aperadas publikaĵoj pri la problemoj de lingvistiko, leksikografio, terminologio, biblioteka scienco, dokumentado, elektroniko, protektado de aŭtoraj rajtoj ktp, ligitaj al la tradukado. En ĉi tiu rilato Babel estas *scienca revuo*, kiu enhavas artikolojn de eminentaj fakuloj. Aliflanke: ĝi estas *faka informilo* de tradukista mondo, sciiganta pri la vivo de FIT kaj pri tiu de ĝiaj naciaj membro-asocioj. Ĝi publikigas informojn pri iliaj eventoj, pri tradukistaj konferencoj, pri edukado de tradukistoj, pri fondado kaj donado de premioj portradukistaj, pri la socia, materia kaj jura situacioj de tradukistaro, pri helpiloj por tradukado.

La akordigo de du diversaj karakteroj estas jam de kvaronjarcento ĉefa tasko de la redaktoraro de Babel.

La mastro de la revuo estas FIT, la internacia organizaĵo de tradukistoj, la ĉefredaktoro estas elektita de ĝia konsilio. De la jaro 1954 la ĉefredaktoro estis ministeria oficisto Erwin *Bothien* (urbo Bonn), post lia morto en 1963 la funkcio transiris ĝis 1970 al advokato Julius *Wünsche* (Konstanz), post li la ĉefo de redaktoraro iĝis universitata profesoro Erich *Weis* (Stuttgart). Li redaktis Babel-on ĝis la fino de 1974. En oktobro de tiu jaro oni elektis al tiu ĉi posteno *la verkinton de tiu ĉi artikolo.*

Vojo de la eldonado estis iom tro aventurplena. Escepte de kelkaj jaroj, kiam la revuo ĝuis la protektadon de konata FRG-a eldona enterpreno Langenscheidt Verlag, la ĉefredaktoroj mem okupiĝis pri la tute ne redaktoraj taskoj de presado, disvastigo, propagando, kolektado de abonantoj. Sekve de tio ne nur la karaktero de tiu ĉi eldonaĵo estis malstabila, sed eĉ pli estis ĝia disvastiĝo. En la jaroj 1975—1976 Babel estis redaktita en Budapeŝto kaj administrita en Frankfurt. Nur ekde januaro de 1977 la eldonado estas en firmaj manoj: de tiu tempo la Budapeŝta *Akademia Eldonejo* aperigas Babel-on kaj la Budapeŝta *Entrepreno Kultura* disvastigas ĝin en la tuta mondo.

Ĉar tiamaniere la taskoj redaktaj kaj eldonaj finfine dividiĝas racie, estas espereble, ke la revuo jam „alvenis havenon". Ĝi ja ankaŭ en siaj malfacilaj jaroj akiris — surbaze de la forto de afero, kiun ĝi reprezentas —, ke *ĝi estu legata en proksimume sesdek landoj,* kaj ke sur ĝiaj paĝoj rendevuu mondfamaj sciencistoj kaj fakuloj.

La lingvoj de Babel estas ĉefe la franca kaj la angla, sed jam aperis en ĝi komunikaĵoj en idiomoj hispana, germana, rusa kaj itala. La ekzemploj, cititaj en la artikoloj aligas dekojn da lingvoj sur la paĝoj de la revuo. Babel aperas kvaronjare en amplekso po tri presejaj folioj.

Nun la revuo havas kvin konstantajn rubrikojn. La plimulto da artikoloj en ĉiu numero grupiĝas ĉirkaŭ unu centra temo. Tiuj temoj estas multspecaj, komuna estas en ili, ke ĉiu strikte koncernas la aferon de tradukado. Troviĝis temoj, alvokitaj de objektiva bezono: *edukado de tradukistoj, buŝa interpretado, vortaroj* kiel helpiloj por la tradukistoj, specialaj postuloj de *fakaj tradukoj*, tradukado de *mezepokaj kaj Bibliaj tekstoj*, la jura protektado de tradukistoj. Estis numeroj, kies temo koncernis po unu aktualan eventon de la tradukista mondo. Tiaj estis ekzemple la rekomedo de UNESKO *pri la protektado* de tradukistoj; la programo de tutmonda kongreso de tradukistoj; poste la aktualecon donis la raportaĵoj pri la kongreso. Sed la ĉeftemoj koncernis ankaŭ tiajn mondsignifajn datrevenojn, kiuj havis ankaŭ rilatojn al tradukado. En 1975 ekzemple unu el numeroj montris, kiel *Thomas Mann* iĝis mondfama de la tradukoj. En 1976 unu numero *okaze de la ducentjara jubileo de Usono* konigis la historion de la unua germana traduko de la *Deklaracio pri Sendependeco.* La numero informis ankaŭ pri la nuntempa Usona tradukista organizaĵo kaj same pri la tiea eduksistemo por la tradukistoj. La temo de la lasta numero de Babel estas Latina Ameriko kaj problemoj de la tradukado. Preparata estas po unu numero, informonta pri la afero de tradukado en Soveta Unio, pri tiu en Afrikaj kaj en Aziaj landoj. Tamen Babel nature ne rajtas forgesi pri sia „hejma" datreveno. Ja ĉi-jare FIT solenos *sian dudekkvinan naskiĝtagon.* La ĉeftemoj tamen ne kaŭzas teman ekskluzivecon: krom artikoloj, koncernantaj ilin, en ĉiu numero regule aperadas artikolo far de iu eminenta reprezentanto de tradukista metio, meritanta ĝeneralan intereson. Principo de redaktado estas, ke ĉiu artikolo ne povas interesi ĉiun leganton, ĉar la legantaro de Babel havas multspecajn interesojn. Aliaj demandoj interesas lingviston, okupantan sin pri problemoj de la tradukado, aliaj la praktikan tradukiston, la lingvoinstruiston ktp. Ni tamen havas principon ne aperigi komunikaĵon, verkitan en ĵargono de plenmano da fakuloj, kiu ne estus interesa legaĵo por iu ajn.

La dua konstanta rubriko de Babel estas tiu, kiu okupiĝas pri la vivo de FIT. Ĝi enhavas la adresaron de membro-asocioj kaj fakkomisionoj de la Federacio kaj same ĝiajn informojn. Ekde 1977 ankaŭ sciencaj vortnovaĵoj (neologismoj) havas apartan rubrikon, kiuj — ne kalkulante la morfologiajn kaj fonetikajn diversecojn de unuopaj lingvoj — unuece eniris en la internacian vorttrezoron. La konigo de tiaj „internaciaj neologismoj" helpas la faktradukistojn, ties disvastigo kontribuas la ĝeneralan evoluon de sciencoj. Tial UNESKO aparte protektas ĉi tiun rubrikon. El la du lastaj konstantaj rubrikoj la unua estas: *informado pri la libroj kaj revuartikoloj,* koncernantaj la metion tradukistan. La dua havas la titolon *Forum.* En ĝi troviĝas diversenhavaj publikaĵoj, ŝercaj artikoloj, aforismoj, debatoj ktp.

Babel publikigis artikolojn *jam el pluraj dekoj da landoj.* El Hungario interalie Sándor *Karcsay* verkis pri la diverseco de postuloj al la faktraduko en la kampoj sociscienca kaj teknika; Gyula *Ferenczy* artikolis pri la edukado de tradukistoj kaj interpretistoj en la Budapeŝta Universitato „Loránd Eötvös"; la verkinto de tiu ĉi artikolo publikigis siajn esplorojn pri la problemoj de la tradukado, farita ne el la originala idiomo kaj pri la ŝanĝiĝantaj vidpunktoj de la tradukado de Biblia vorto „logos". Hungario rolis ankaŭ en la informoj. Ĉi-rilate estis granda evento, kiam en 1977 la *internacian portradukistan premion* el sveda fonduso ricevis Zoltán *Csuka* pro sia verkaro.

Babel *okupiĝis ankaŭ pri Esperanto:* en 1965 kompetenta aŭtoro — Kálmán *Kalocsay* — konigis la historion de la Esperanta tradukarto. En 1976, bedaŭre, lia nekrologo iĝis aktuala; tiam la revuo skizis lian *karieron esperantistan.* Ni informis pri la multlingve aperinta libro „Babel kaj Antibabel" de la hungardevena Paulo *Rónai,* vivanta en Brazilo, eminenta fakulo pri la franca-portugala tradukado. Tiu ĉi artikolo same tuŝis problemojn, koncernantajn Esperanton.

La pordoj estas apertitaj. La Esperanto-movado ja fundamente estas kunligita kun la tradukado, eĉ: tio estas ĝia oksigeno ĝis ie naskiĝos amase denaskaj esperantistoj, do ĝis nemezureble longa tempo. La principaj kaj praktikaj demandoj de la tradukado, kiujn Babel pritraktas, tuŝas la ĉiutagan praktikon de esperantistoj. Kaj se iam ankaŭ la esperantistaj tradukistoj farus sian organizon, tiam eble FIT, kiu ĝis nun aligis nur landajn asociojn de tradukistoj, eble ankaŭ ilian organizaĵon membrigus al sia internacia familio.

Antaŭ kvaronjarcento FIT estis fondita de tradukistaj asocioj de kvin okcidenteŭropaj landoj. Ĝi hodiaŭ havas *34 membro-asociojn el 29 landoj* (el Britio, Francio, Japanio, Jugoslavio kaj FRG nia Federacio havas po du membro-asociojn). FIT apartenas al la plej alta kategorio de neregistaraj („non-governmental") organizoj de UNESKO. La Federacio havos sian sekvan kongreson en la jaro 1980 en Varsovio, kaj ni estas konvinkitaj: ankaŭ tie oni povos raporti pri la nova, eĉ rapidega evoluo de Babel.

Tr.: *R-p-a*

LEHEL

KOMPRESORA HEJMA FRIDUJO

240 lit. *
ultrafridujo 20-litra, -18 C°

Fridiga nutraĵkamero de la familio



Produktas: HŰTŐGÉPGYÁR Jászberény

PORTRETOJ DE JÓZSEF SZALATNYAY

Portreto pri skulptartisto Tibor Vilt (1977)



Zoltán Kodály (1961)

Sibilo (1938)

Jam delonge ne estas mode desegni kaj pentri portretojn, kiuj similas al la modeloj, kaj entute krei portretojn estas tute malmoderna afero. József *Szalatnyay** (nask. 1915) tamen komencis sian artistan karieron desegnante kaj pentrante kapojn, famajn kaj nekonatajn, kaj hodiaŭ li estas unu el la plej renomaj hungaraj portretistoj.

Kial oni parolas pri elstara kapableco de pentristo, se li scias pentri aŭ desegni bonajn portretojn? Tial, ĉar por tio ne sufiĉas ellerni fakscioj, la historion de l' artoj, sed oni devas koni tre-tre altnivele la homojn, kaj tute speciale la modelojn, kiuj estas por la pentristo ne nur individuoj, sed samsortanoj. Kaj devas scii eĉ pli multe tiuj, kiuj deziras krei suverenan arton, temprezistajn bildojn.

Do, verajn portretojn povas krei nur tiu, kiu scias ĉion pri la homoj. Kiu vidas akre la detalojn, kiel la plej modernaj fotoaparatoj, sed eltrovas ankaŭ la ĉeftrajtojn, kiuj esence karakterizas la figurendajn modelojn.

Tiel fariĝis eminenta portretisto Szalatnyay kaj lia lasta ekspozicio (Budapeŝto, 1977) estis vere elstara, ĉar liaj bildoj ateŝtas pri posedo de la menciitaj virtoj. Por multaj vizitantoj estis vera surprizo vidi, ke jam komence de sia kariero, en la tridekaj jaroj li desegnis nature, kiel maljunaj majstroj. En tiu tempo estis kreita *Sibilo* (1938, krajondesegnaĵo, 54x33 cm). Tre verŝajne Szalatnyay konis la modelon, tamen la preta bildo ricevis la nomon „Sibilo", kiun havis divenistinoj ĉe la antikvaj grekoj kaj romianoj. Ĉu ĝuste? Jes: oni facile konstatas, ke ĉi tiu virino ne estas simpla persono, sed ŝi estas *la* aŭguristino.

Observu zorge la portreton de la fama hungara komponisto *Zoltán Kodály* (1961, paŝtelo, 62x48 cm). Vi, kiel legantoj de Hungara Vivo jam multfoje vidis fotojn de Kodály, sekve nun vi povas prijuĝi, ĉu ĉi tiu portreto estas artaĵo, vere pli profunda ol la plej bravula fotografaĵo? La samo koncernas ankaŭ la trian bildon, portreton de *Tibor Vilt*, moderntalenta hungara skulptisto (1977, penikdesegnaĵo, 32x20 cm). Ĉu necesas diri, ke la prezentita viro ne estas ĉiutaga homo? Mi supozas, ke ne, ĉar la portreto malkaŝas ne nur eksterordinaran erudicion, volon, grandformatan talenton, sed ankaŭ la artiston mem. Pro tio la portretoj de József Szalatnyay estas aprecataj pecoj de hungaraj kaj eksterlandaj muzeoj.

Mihály *Gergely*

*Pron.: sa! latnjai.

Edward Gierek, unua sekretario de la Centra Komitato de Pola Unuiĝinta Laborista Partio kun János Kádár, unua sekretario de la Centra Komitato de Hungara Socialisma Laborista Partio.

Mil jaroj kaj tridek — en amikeco

Malofte okazas, ke la amikeco de du popoloj povas retrorigardi al mil jaroj. La tempestoj de la historio jen proksimigas, jen forpuŝas la popolojn unu de la alia. Sed en la kazo de hungaroj kaj poloj ne tiel okazis. Eble tion klarigas, ke la filoj de ambaŭ popoloj luktis kontraŭ similaj problemoj, eĉ ofte ili batalis kune. Tiu longa kaj reciproka simpatio antaŭis la kontrakton, kiu en 1948 donis firman, principan bazon al la kontakto de la du popoloj.

Dum la tridek jaroj ekde la subskribo ĉiam pli intense evoluis la kunlaboro sur la plej diversaj terenoj. Krom konstruado de komuninteresaj entreprenoj abrupte kreskas la volumeno de varinterŝanĝoj kaj sama estas la situacio ankaŭ rilate la kulturajn kontaktojn. Reciprokaj vizitoj de artistoj, koncertoj, ekspozicioj, teatraj prezentadoj helpas al ambaŭ popoloj pliprofundigi la malnovan, sinceran amikecon.

Ekspozicio de junaj polaj belartistoj okaze de hungaraj-polaj junularaj amikecaj tagoj.



Jubilea



István Szabó, la maljuna, sed ne laciĝema artisto ankoraŭ plenforte laboras



O-PANORAMO

ekspozicio

La Hungara Nacia Galerio aranĝis ekspozicion omaĝe al la 75 jara naskiĝdatreveno de István *Szabó*, lignoskulptartisto.

La kariero de la iama ĉarfaristo de bienulo bone prezentas la naturan vivoforton, diligentecon — kaj ne lastvice la talenton de la laboranta popolo. Pro malfavoraj cirkonstancoj neniam li povis akiri altgrandan artan instruitecon, sed kiel celkonscia, ne laciĝema aŭtodidakto li atingis altan rekonon kaj en- kaj eksterlande. En 1959 li estis distingita per Kossuth-premio kaj en 1971 per la premio de Landa Konsilio de Sindikatoj.

Li skulptas el ligno, kies specojn kaj naturon li perfekte konas. La lignostatuo iel — ankaŭ en la praaj epokoj — povis interpreti la plej senperan intiman direndon, ĉar ĝia kreinto de sur la sama nivelo alparolis tiujn, kiuj akceptis, deziris lian arton. Tiel alparolas nin ankaŭ la arto de István Szabó, prezentante popolon de sia regiono en simplaj ĉiutagaj laboroj, scenoj. La simpleco kaj sincereco de liaj verkoj havas konvinkan, kaptivan forton kaj faras lian direndon ĉie valida kaj eterne homa.

La artlaborejo de skulptisto István Szabó en la vilaĝo Benczúrfalva.

S-ino N. Sebestyén transdonas la memormedalon al ĉefredaktoro Imre Szenes

Pacagado honorigita

La Hungarlanda Packonsilantaro havis kunsidon la 28-an de junio en la Parlamentejo. La ĝenerala sekretario, s-ino N. *Sebestyén* raportis al la partoprenantoj pri la kunvoko de la 9-a Hungara Packongreso kaj pri la taskoj koneksaj kun ties antaŭpreparo. Poste István *Sarlós*, ĝenerala sekretario de la Konsilantaro de Patriota Popolfronto parolis pri aktualaj demandoj de interna kaj ekstera politiko. Post la kunsido estis disdonitaj honorigaj memormedaloj de la Packonsilantaro al elstaraj aktivuloj de la Pacmovado.

Sur nia bildo Imre *Szenes*, ĉefredaktoro de nia frata gazeto, *Világ és Nyelv* (Mondo kaj Lingvo) transprenas la memormedalon atribuitan al li pro multjara, senlaca laboro per Esperanto por la paco.

Festaj semajnoj de Szeged

Juna aktoro kaj reĝisoro Ferenc *Hont*, kiel raportisto de Szeged-a ĵurnalo faris intervjuon en 1927 kun la fama reĝisoro Firmon *Gemier*, tiama prezidanto de Mondligo de Teatroj. Post ĉi tiu interparolado naskiĝis la ideo: estigo de liberaeraj ludoj, prezentado de mondfamaj teatraĵoj laŭ nekutima maniero povas signifi por provinca urbo altiĝon de nivelo de kultura vivo, aliĝon en sangocirkuladon de la granda mondo kaj ankaŭ kreskigon de fremdultrafiko.

La unuan prezentadon oni aranĝis sur la Dom-placo de Szeged en 1931 En 1933 estis prezentita la unuan fojon *La Tragedio de l'Homo* de *Madách*, kiu ankaŭ ĝis nun estas unu el la plej sukcesaj teatraĵoj de la — en 1959 rekomencitaj — Festaj Ludoj. Dum la pasintaj 19 jaroj 304 prezentadoj de 59 scenejaj verkoj estis spektitaj de unu kaj duono da milionoj da homoj.

Ĉi jare estis la dudeka somera teatra sezono en Szeged. En la programo ni trovis la operon Hunyadi László de *Erkel;* la dramon Bánk bán de *Katona*, la kantludon János Vitéz (Johano la Brava) de *Kacsóh*, la baleton Coppelia de *Delibes* kaj la prezentadon de la Hungara Ŝtata Popolensemblo. Krom tiuj ankoraŭ duoncento da diversaj aranĝaĵoj — koncertoj, ekspozicioj, sportaj konkursoj kaj industria foiro atendis la interesiĝantojn dum la Festaj Semajnoj en Szeged.

REVUO DE REVUOJ

Muso kaptas kato

Ĉu hieraŭ li venas? La lupo kiu ŝafo ŝatas. — Ege klaraj frazoj, ĉu ne? Tamen troviĝas lingvistoj, ĉefe anglosaksaj, kritikantaj E-on, kiuj atendas de IL tiajn frazojn. Ili opinias, ke akuzativo, is-formo, kaj aliaj gramatikaĵoj okaze estas superfluaj, „ne-ekonomiaj" formoj laŭ ia elcerbumita logiko. KOMUNA E-GAZETO skribas pri tiaj riproĉoj, kaj tuj brave defendas la nepran bezonon de konsekvenca, strikte regula gramatiko, sen kiu nia lingvo perdus la klarecon, elastecon, stilan liberecon. Antaŭ tiuj pretendoj, por taŭge esprimi kaj kompreni unu la alian, eĉ internacie, devas reteni sin la tendenco de *lingvo-ekonomio,* t. e. la ŝparemo, tiom natura procedo en la lingvaĵo de ĉiu popolo.

La lingvo de iu socio ne-eviteble spegulas sian socian bazon, kaj kiel ĉiu vivanta strukturo, ankaŭ la lingvo ŝanĝiĝas kaj konservas, elementojn asimilas kaj elĵetas, kreskas dise kaj konciziĝas — fare de la socio. Pri tio skribis erudicie Claude *Piron* (klo:d) en ESPERANTO, kaj lia propono ŝajnas al mi aplikinda, en la propagando. Temas pri biologia metaforo: la Fundamento (1887) kiel *ĝermo,* kaj la esperantistaro kiel nutranta *grundo* — *ili kune* ebligis E-on disvolviĝi kiel vivanta estaĵo. Estas vere, ke Zamenhof asertis, ke li mem estas nur *iniciatinto* de la lingvo, kaj ne ties *kreinto.* Kvankam ĉiam estis konate, tamen „jam temp' está" pli forte emfazi: *multaj uzantoj kune kreis E-on!* La esperantista kolektivo naskis kaj alprenis vortojn, formaciojn, rifuzis aliajn, forigis aŭ igis arkaikaj multajn.

La destino de Esperanto

Kiel ĉiu artikolo de d-ro *Szerdahelyi* (serdaheji), ankaŭ lia tiutema eseeto en HEROLDO DE ESPERANTO meritas plenan atenton. Per akraj linioj kaj kontrastoj, samkiel en scienca analizo, Szerdahelyi trafe karakterizas tipojn de la vere sektecaj esperantistoj, kaj tiujn de la kaŝe, latente sektecaj. Kvankam diversmaniere, tamen precipe personaj celoj formas ilin tiaj, farti agrable en malvasta medio esperantista. Vekiĝas en mia memoro la preskaŭ duonjarcenta brila satiro pri la verda popolo en la „Verda Biblio" de I. *Lejzerowicz*... Oni devas cetere konsenti kun la aŭtoro, ke la plej forta tendenco devas esti en nia tendaro la strebado por oficialigi E-on, igi ĝin vere IL, por kia rolo ĝi estas destinita. Konsekvence, ege gravas tiuj esperantistoj, kiuj multflanke agas tiucele: altnivele flegas la lingvon, informadas la publikon kaj la decidajn mediojn kaj tiel plu.

Ne eblas tamen flankenlasi, ke al tiu ĉi agado la „grupanoj" ĝenerale alproksimiĝas el la sferoj de la „amuzantoj" aŭ „praktikaj utiligantoj" de nia lingvo. Ĝuste la menciita grava tavolo bezonas ke ĉirkaŭ ĝi etendiĝu kiel eble plej vasta medio, kiu kompreneble varbiĝas laŭ personaj motivoj, vidu supre! Ja, ĉirkaŭ tiu kontraŭdiro fluis internacia diskuto longe en BUDAPEŜTA INFORMILO sub titolo: „Kiu estas sekta esperantisto?"

Ideologio aŭ instrumento?

Proksimas al la jam menciitaj ankaŭ ĉi tiu temo, diskutita en DER ESPERANTIST. Kontraŭ aserto de Detlev *Blanke,* „E-o estas instrumento, nenio pli", pluraj indigniĝis. Aleksandr *Ĥarkovskij* substrekas la interligon de lingvo kaj kulturo, validan ne nur por nacia sed ankaŭ por internacia lingvo. Estu permesate aldoni, ke *lingvo* (de iu socio) portas konforman kulturon, kaj aliflanke *kulturo* (de iu socio) bezonas komunikilon, pro tio ĝi flegas kaj evoluigas sian lingvon. La ekzistado de E-o klare evidentigas *ambaŭ* rilatojn (kaj ties disvolviĝojn), tute ne sole la lastan, la ilan — mi kuraĝus diri: la IL-an.

Kaj plu: en kulturoj manifestiĝas ideologioj (ofte pluraj), kaj E-o estas specife konvena porti internaciismajn ideologiojn. En nia mondo ekzistas egaj bezonoj je internaciismo (kultura faktoro), kion la sola sukcesinta IL memkompreneble surprenis. Tiel kreiĝis nia lingve fundamentita, internaci-cela, internaci-kultura movado.

Kvazaŭ alrimas ĵus legita informo de la multe laŭdinda PILO-PRESS. — *Kiel fulma frapo venis informo pri subita forpaso de ĝia grandmerita redaktoro Ludwig Pickel. Kia perdo por nia movado!* — En la bretona urbo Rennes (renn), la kongreso de SAT-Amikaro en rezulucio solidare avertis kaj pro la *kontraŭnaturaj* agresoj, kia trafis plage i. a. la bretonan marbordon, kaj pro la *kontraŭhomaraj* minacoj de la vetarmado. Aperis la amasmurdiloj: la nukleaj armiloj, — laste jam la neŭtrona bombo —, kiuj minacas ekstermi la homaron! Aŭ „nur" la duonon? La sola respondo: per ĉiuj fortoj almenaŭ bremsi kaj haltigi, poste neniigi *unuavice* tiujn amasmurdilojn, ties „fabrikadon, vendon kaj ŝakradon."

Gazetojn foliumante

Inter la movadaj bultenoj mi vidis per kontentaj okuloj la 13 tutpaĝajn, pagitajn reklamojn en STARTO de ĈEA. Ĉie troviĝas institucioj, entreprenoj, sciencaj-teknikaj institutoj, kiuj ambicias prezenti siajn sukcesojn antaŭ la internacia publiko, eĉ per propraj reklam-artikoloj. Tiuj montras la gazeton certe pli serioza!

La majstra redaktora plenumo ĉe HEROLDO DE ESPERANTO igas min demeti la ĉapelon En la 5—6. nro 5 grandaj paĝoj estas dediĉitaj al la kongreslando. Precipe sukcesis veki intereson artikol-serio de Bernard *Golden,* pri prahistoriaj kaj antikvaj periodoj de la Bulgara lando.

Ervin *Fenyvesi*

recenzoj - recenzoj

KVAR MAJSTROPOEMOJ

William Auld: El unu verda vivo. Originalaj poemoj. Eldonis: Lingvoponto, Kuopio 1978. 44. p., 21,5 cm. Prezo por Hungario: 30,— forintoj.

Verŝajne multaj esperantistaj poemŝatantoj konstatis iom malkontente, ke la poeto Auld preskaŭ tute eksilentis. Li eldonis sian lastan poemaron *(Humoroj)* antaŭ naŭ jaroj, en 1969. Depost tiu tempo nur sporade oni renkontis liajn poemojn sur la paĝoj de la Esperantaj revuoj; li turnis sian atenton al aliaj terenoj de la kulturo, kiel redaktado *(Norda Prismo* kaj *British Esperantist)*, verkado de eseoj *(Facetoj de Esperanto)* kaj movadaj taskoj (li estas vicprezidanto de UEA).

Tiu ĉi kajero fakte ne estas poemaro en la evoluinta senco de la vorto, nur ar(et)o da poemoj. Auld kolektis sian produkton de la lasta jardeko, kaj tiu produkto estas malgranda. La poemoj ne formas kontinuan ĉenon, en kiu ili jam per la sinsekvo radius mesaĝon al la leganto: la *tuto* ŝajnas iom senkohera. Auld probable mem ne konsideras tiun ĉi libron vera poemaro, kaj pri tio nin atentigas jam per la intimeleĝera titolo: *El unu verda vivo.*

Se la tuto montras ioman senkoherecon, kelkaj el la poemoj estas etaj — kelkfoje eĉ ne etaj — ĉefverkoj. Tiaj estas precipe la unuaj kvar »epistoloj« (al *J. Régulo Pérez, W. R. Harmon, Ch. Schulze* kaj *S. Milojeviĉ*), ampleksantaj sume 25 paĝojn. La nomo de la adresatoj ne multe gravas en tiuj poemoj: ili estas fakte monologoj, en kiuj Auld konfesas pri siaj duboj, timoj kaj angoroj, kaj pro la sento de izoliteco li turnas sin al homoj kiuj vivas je pluraj miloj da mejloj, kaj — kiom ajn bonaj amikoj ili estu — ili fariĝas komprenemaj aŭskultantoj dank' al la »beliganta malproksimo«. El la kvar poemleteroj verŝajne la plej grava estas la dua, adresita al W. R. Harmon: en tiu ĉi poemo ni vidas reaperi en la plej gravaj dimensioj la poeton de *La infana raso.* La sama meditado pri la nuntempa mondo kaj la loko de Esperanto en ĝi, karakterizas la versleteron al S. Milojeviĉ, kun la diferenco, ke en tiu ĉi poemo ricevas pli fortan emfazon Esperanto mem kun siaj gajnoj, fiaskoj kaj luktado.

Tiuj ĉi kvar »leteroj« nepre pruvas, ke malgraŭ la malmulta produkto la poezia fonto de Auld ne sekiĝis. Li sukcesis renoviĝi, trovi tonon adekvatan al la epoko kaj samtempe al sia propra memo. Post la privatsfera ekskurso en *Humoroj* — kiun fakte mi ne trovis tre sukcesa — li revenis al sia vera tereno: la intelekta prilaboro, analizo de la mondo. Kompare al *La infana raso* lia voĉo sobriĝis, li sendube perdis iom el la junaĝa vigleco, elano, sed per tio lia poezio fariĝis pli profunda, penetra, kaj ne laste: forme pli simpla, klasika. Serĉante paralelojn en la Esperanta poezio, kvazaŭ proponas sin por komparo malfrua poemo de Kalocsay: *Letero al William Auld...*

La resto de la volumeto, mi konfesas, malmulte impresis min. Iel sonas nenature ankaŭ la memorpoemo pri Kalocsay *(La Torĉportinto).* Nur en la ciklo »Vojaĝalbumo« oni trovas kelkajn ĉarmajn pecojn.

Aĉetante tiun ĉi poemlibreton, vi ne posedos novan *poemaron* de Auld,, sed havigos al vi kvar *majstroverkojn.* Antaŭ ol decidi, pripensu, kiom da dikaj poemaroj troviĝas sur viaj librobretoj, kiuj enhavas nek unu tian!

TRUDHERBO DE ESPERO

Paliĝas tamen la falvaj folioj
kaj vaporas.

La lozaj nuboj
likviĝas en grizan ploron,
kaj ree ĝermas sub la olivarboj
trudherbo de espero,
kvazaŭ obstina markoto.
Navigi plu
tra via larĝa frunto,
laŭ la mildaj huloj
de viaj pensoj.

Ĉar vian vivon
la bluo traarkas,
lambastono de miaj revoj.

Mauro *Nervi*

BAZA STUDLIBRO

Esperanto (Lingvo, movado, instruado.) Redaktis: D. Blanke. Eldonis: Centra Laborrondo Esperanto, Berlin, 1977. 187 p., 20 cm. Prezo por Hungario: 35,— forintoj.

La progreso de nia movado multe dependas de la informiteco de ĝiaj membroj. Eĉ pli grave estas, ke niaj aktivuloj havu klarajn konojn pri la akiraĵoj, aktualaj problemoj kaj pri la konkretaj celoj, por kiuj ni laboras. Necesas ankaŭ, ke tiuj konoj estu science bazitaj, ja estas maleble argumenti per romantikaj kaj sentimentalaj rimedoj en epoko, kies tuta ekzisto preskaŭ ekskluzive bazas sin sur la scienco.

La studaro, redaktita de *Blanke*, tre bone servas tiun ĉi celon. Ĝi enhavas 19 kontribuaĵojn de 12 kontribuantoj el 10 landoj, kaj kelkajn gravajn dokumentojn *(Grava decido de la Akademio de Sciencoj de USSR, Rekomendoj de la Akademio* ktp.)

Sendube la plej valora sekcio de la libro estas la unua (90 paĝoj), kiu priskribas la lingvon. Po du studoj el la plumo de *Bokarev* kaj *Blanke* pritrakas la ĝeneralan lingvosituacion en la mondo kaj la eblajn solvojn, konvinke kaj racie argumentante por Esperanto. La sekvaj kontribuaĵoj — de *Zamenhof, Bokarev* kaj *Kalocsay* — analizas Esperanton mem. Nepre studinda estas la *Esperanta vortfarado* de Kalocsay, kaj lanĉas tre interesajn kaj aktualajn problemojn ankaŭ *Fonemo kaj sono en Esperanto* de Bokarev, kvankam lia starpunkto pri la prononco estas evoluigenda. Utilajn informojn donas ankaŭ la fama studo *La fontoj de Esperanto* de D. B. *Gregor*, pro teknikaj kaŭzoj aperanta kiel aldono fine de la volumo.

La sekcio »Movado« ŝajnas iom malpli profunda kaj sistema. En ĝi elstaras la konciza sed informriĉa artikolo de Blanke: *Pri la stato de la internacia aplikado de Esperanto,* kaj certe vekos intereson ankaŭ la kontribuaĵo de *Nguyen Van Kinh,* kiu donas informojn pri la Esperanto-movado en Vjetnamio. Aperas pluraj materialoj pri MEM, sed mankas bona analizo pri la ĝenerala movado.

La instruadon de la lingvo pritraktas tri kontribuaĵoj: du de *Pettyn* kaj unu de *Oljanov.* Ili donas bonajn sugestojn al la instruistoj, kvankam kompreneble ne temas pri kompleta metodologio.

Espereble multaj el niaj legantoj sukcesos havigi al si tiun ĉi utilan studlibron.

V. B.

KULTURA KALEJDOSKOPO

MARIO PEI MORTIS. La fama lingvisto forte subtenis la internacian lingvon, propagandis Esperanton al la publiko, kaj ne malpli en la lingvisto-rondoj, kie li havis altan respekton. En multaj verkoj kaj artikoloj li pledis por la nepra bezono havi neŭtralan internacian lingvon, kaj elmontris la lingvan taŭgecon de Esperanto. Post longa malsano, en sia 77-a jaro li forpasis en Glen Ridge, Usono.

* * *

LUNAČARSKIJ, kiel popolkomisaro por klerigo, kaj honora prezidanto de la VI-a Internacia Kongreso de Laboristoj—Esperantistoj, en 1926 perletere salutis tiun kongreson, kunvenintan en Leningrado. Lia saluto estis laŭtlegita dum Esperantlingva elsendo de Radio Moskvo ĉijare; indas citi kelkajn gravajn opiniojn de tiu revolucia grandulo: „Tiu ĉi movado vastiĝas kun nerefutebla potenco, kaj transformiĝas je unu el la plej seriozaj fenomenoj de la moderna socia vivo... Mi tutanime deziras al Esperanto pluan proksimiĝon al la avangardaj formoj de la batalo laborista, kaj pluajn sukcesojn."

* * *

En la itala parlamento 30 deputitoj fondis grupon „Amikoj de Esperanto". En la prezidantaro partoprenas 5 partioj, ankaŭ senataroj, la prezidanto iĝis Alberto del Nero, kristana-demokrata senatano, kiu emfazis, ke ankaŭ alilande estas bezonataj similaj parlamentaj grupoj. Se tiuj ekzistos en sufiĉa nombro. estos eble krei ene de la Interparlamenta Unio ankaŭ internacian parlamentan sekcion de Esperanto-amikoj, diris senataro Nero. Sciinde, ke en la hungara parlamento jam ekzistas tia grupo.

* * *

A.—M. M'BOW, ĝenerala direktoro de Unesko parolis en Lucerno (Svislando) en kunveno de Mondasocio de Lingvo-Instruistoj pri lingvo-problemoj en internaciaj asocioj. Respondante je demando, M'Bow dek-minutojn longe parolis favore pri siaj spertoj en Rejkjaviko, pri Esperanto, lingvo kaj movado.

* * *

Latin-Amerika Kongreso de Esperanto unuafoje okazis en julio, en la brazila urbo Marilja. Granda partopreno, ankaŭ el ekster tiu kontinento, karakterize montris la prosperiĝon de nia lingvo, la disvastiĝon de nia movado en tiu parto de la mondo.

* * *

En Baŝkiria urbo *Ufa* estas praktikata universitata kurso de interlingvistiko kaj de Esperanto. Ĉi-jare la kursojn, gvidatajn de Boris *Kolker*, partoprenas devige pli ol 40 filologo-studentoj.

* * *

KOMPUTILO PAROLIS klare en Esperanto. Male, la aparato elparolis fuŝan, torditan, ne bone kompreneblan anglan lingvon, kaj apenaŭ pli klare aliajn kvar lingvojn. Tiu evento okazis en Ĉikago, dum kongreso de Modernlingva Asocio de Usono, kie d-ro Bruce A. *Sherwood* (ŝervud) montris la elstarajn instru-kapablojn de komputila instruaparato fare de Universitato Illinois. „Platono" — tiel ĝi nomiĝas — kapablas respondi Esperantlingve tajpitajn demandojn de la lernanto, multe pli rezultplene, ol tio estus ebla per aliaj lingvoj.

* * *

EN BEIRUT, ĉefurbo de Libano, dum la internaj bataloj neniiĝis — kun granda parto de la urbo — ankaŭ la Esperanto-centro de Libano. Forbrulis la biblioteko, kontoro, ĉiu instalaĵo de la organizo. Laŭ peto de ĝia prezidanto, la tutmonda movado klopodas restarigi per helpoj la movadan centron.

Universala Kongreso de Sociologio okazis dum aŭgusto en *Uppsala*, malnova universitata urbo de Svedio. Estis organizitaj prelegoj kaj diskuto aparte pri lingvokomunikadaj problemoj en internaciaj rilatoj.

* * *

FAKARTIKOLO—SERION eldonis la Studenta E-Societo en Oslo, kiu konsistas jam el preskaŭ 20 artikoloj kun ĉ. 700 paĝoj. La serio enhavas studojn, de geologio kaj zoologio ĝis filologio kaj juro, tre diversajn pecojn, kiuj estas haveblaj pere de bibliotekoj kaj librovendejoj.

* * *

MUZIKA ESPERANTO-LIGO funkcias jam pli ol jardekon. MEL rezidas en Anglio, kie oni eldonas inter aliaj eldonaĵoj ankaŭ la revuon Muziko, por internacie kontaktiĝi kun la membroj.

* * *

La iama Ligo de l' Nacioj ankoraŭ en 1923, dum plena kunsido akceptis rezolucion laŭ la raporto de la ĝen. sekretario pri „Esperanto kiel internacia helplingvo". Post pli ol duonjarcento ankoraŭ ŝajnas aktuala la verhava kaj science bone fundita 50-paĝa studaĵo, kiu rekomendis al la registaroj favorajn paŝojn rilate enkondukon de E-o. La oficiala germanlingva teksto de tiu aprobita raporto nun estis denove eldonita en *Nürnberg*, fotoofsetite laŭ la originalo.

* * *

UN-sekretariato en Novjorko ricevis oficialan peton de Portugalio: oni levu inter la oficialajn lingvojn de UN ankaŭ la portugalan. La argumento ŝajnas vere grava, ĉar ĝi konsistas el aludo al la grandnombraj parolantoj de la portugala lingvo... Estas jam signoj de similaj pretendoj flanke de Hindio, Japanio, Italio, Indonezio kaj tiel plu...

E. F.

KIA ESTAS KUBO?

Havana strato

Kvankam pasis jam kvar jaroj de kiam mi adiaŭis Kubon, tiun sunbrilan, miraklan Kariban landon, ankoraŭ ne estingiĝis en mi la memoroj; ili vivas tiom freŝe en la fantazio, kiom antaŭ kvar jaroj. Ĉar la Kuba popolo, ilia viv- kaj pensmaniero absolute identas, kaj samtempe, absolute malsimilas tiun de la hungaroj. Kial? Ĉar parencigas nin la historio, la longdaŭra subpremiteco, la liberecbataloj, la multfoje perfortita liberemo. Sed disigas nin la tute malsama klimato — kiu certe influas kutimojn, temperamenton —, la etna konsisto de la popolo, la kultura heredaĵo. Tamen, samas la sociaj ideoj kaj celoj, la homcentra pensmaniero.

Unujara kunvivado kun tiu entuziasma, optimisma popolo nerimarkeble ŝanĝas la personecon de eksterlandano. Tial, je fino de mia restado tie, sufiĉe fiere mi aŭdis diri la amikojn: „Aŭskultu, vi jam tute estas bananiĝinta!" Tiun distingon ricevas eksterlandanoj, laŭ parolmaniero kaj kutimoj konfuzeblaj kun Kubanoj — do, per iom da bonvolo. „Bananiĝinta" signifas „Kubaniĝinta": ĉar la banano, la bananarbo same kiel la reĝ-palmo por mi estas simbolo de Kubo. La banano estas tiel kutima frukto por kubanoj, kiel por ni la pomo, kaj la rektatalia, eleganta reĝ-palmo eble nenie estas tiom alta kaj majesta, kiom en tiu subtropika lando.

Neforgeseblas la eterna somero, la eterna sunbrilo, la revige buntaj pejzaĝoj, la turkisa maro; la kabanoj de montaro Sierra Maestra kaj la modernaj laboristaj loĝdomoj; la rikolto de sukerkano en senfinaj grundoj, la enŝipigo de sukermontoj; la arĝenta luno hispaneske aperanta super la kolonistila Havana katedralo; la karnavala danco de negroj kaj mulatoj, memoriganta pri Afriko; la pene skuiĝadantaj aŭtobusoj, plenaj de babilema ĉiukolora homamaso; la cigarfabriko; la loĝdomo de Hemingway, liaj ŝatataj kokteloj: *daiquirí* kaj *mojito*, kaj la fiŝista vilaĝo Cojímar, kie la maljuna fiŝisto sonĝis pri la granda fiŝo... Senombraj travivaĵoj kaj impresoj, kiujn mi kolektis kaj gardos kiel trezoron dum la tuta vivo. Ĉiu ajn vizitanta Kubon, spertas atmosferon de lando riĉa je naturo kaj homaj kvalitoj.

Tamen, kia lando estas Kubo? Lando de la moviĝemo kaj kirliĝo. Ĉu tage, ĉu nokte, kavalkadas la stratoj. Je la naŭa-deka vespere komenciĝas la vera vivo, post la ĉeso de la grandega varmo. Muziko, danco, zumanta konversacio, ekkrioj, ekvokoj: kvazaŭ ĉiam estus karnavalo, festo. Sed dum la plej varmaj horoj, de la dua ĝis la kvara posttagmeze, Kubo fariĝas lando de la lulseĝoj. Ĉie, sur terasoj, en ĝardenoj, sub la palmoj kaj cedroj, balanciĝas lulseĝoj: la Kubanoj faras sian sieston...

Ne nur la distradon kaj la ripozon ŝatas la Kubanoj, nature, sed ankaŭ la laboron; kaj tion ili faras fervore, sciante, ke la popolo devas venki grandegajn malfacilaĵojn. Dum dekok jaroj pasintaj post la revolucio, la Kubanoj plenumis sisifan laboron. Tion ili faras celkonscie, decide — tamen gaje, bonhumore. Kubo estas lando de la konstantaj revoluciaj fortostreĉoj, realigitaj kun serioza gajeco — aŭ ni diru, gaja seriozeco.

Nature, la grandiozaj land- kaj socikonstruaj laboroj bezonas kolektivan fortostreĉon. Kaj Kubo estas lando de la kolektivemo. La Kubanoj tre bonŝance miksas la respekton al la privata vivo de l' homo kun la konstanta, fervora interesiĝo pri ĉies problemoj, ideoj, planoj. En mia cerbo gravuriĝis por ĉiam sceno okazinta sur unu de la Havanaj stratoj.

Maljuneta, bonvestita homo marŝadis, kun longegaj lignaĵoj sur la ŝultroj. Venis renkonte lin nekonato, kiu ekatentis pri la stranga olduleto kaj demandis lin: „Aŭskultu, kamarado, kion vi faros per tiuj lignaĵoj?" La olduleto klarigis, ke li riparos ion en la domo, kaj post kelkminuta babilado, ili disiĝis — eble neniam revidos unu la alian. Kubo estas lando de diskreta scivolemo, de la familiaraj interhomaj kontaktoj.

Ĝi estas lando de... ne eblas denombri ĉion.

Kia estas Kubo? La partoprenintoj de la Tutmonda Festivalo de la Junularo verŝajne kunportis almenaŭ tiel belajn memorojn, kiel mi.

Zsuzsa *Varga—Haszonits*

Renaskiĝo de la lago Velencei-tó

D-ro Ferenc László

En la vico de konsiderindaj ekzemploj de homa agademo, sperta diligenteco, eminentan lokon okupas laboro, dank' al kiu antaŭ niaj okuloj renaskiĝas la dua refreŝigeja lago de Hungario: *Velencei-tó.*

Sekve de ĝisnunaj penadoj la lago *Velencei-tó* fariĝis signifa bazo ne nur por sinbanado kaj fiŝhokado, sed ankaŭ por akvosporto. Tio konvinke pruvas, ke la ideoj kaj klopodoj celantaj plijunigon de nia trezorvalora lago, nia „dua Balatono", ne restis nuraj deziroj, sed ili parte jam realiĝis kaj dekmiloj da homoj serĉantaj refreŝiĝon ĉe la lago, jam ekde jaroj povas ĝui la fruktojn de la laboroj ĝis nun faritaj. Ege pligrandiĝis la altirforto de la lago, sur ĝiaj bordoj fungosimile plimultiĝas la somerdomoj, dum la lastaj jaroj ĝiaj plaĝoj iĝis favore frekventataj. Homoj dezirantaj ripozon nuntempe jam povas ĉi tie senĝene ĝui la agrablan akvon de la lago, same kiel la belecon de la pejzaĝo.

Ĉio ĉi montras, ke la homo feliĉe ekposedis tiun plijuniĝintan lagon, kiu antaŭ tri-kvar jardekoj prezentis ankoraŭ — pro ĝia maljuniĝo — ege malĝojan vidaĵon.

En kio kaŝiĝas la tirforto de Velencei-tó?

La lago kaj ĝia ĉirkaŭaĵo havas tre favorajn naturdonitajn faktorojn. La sablaj bordoj de la dua refreŝigeja lago de la lando norde renkontiĝas kun la deklivoj de la montaro *Velencei-hegység,* sude ili transiras en la leŭsan ebenaĵon de *Mezőföld.*

La akvospegulo kun kanej-insuletoj, la arbarkovritaj montetoj altiĝantaj super ĝi, la konstruitaj ĉirkaŭ ĝi loĝlokoj — esence kune kun la akvokolekta teritorio de la lago — formas la specifan refreŝigejan regionon. Sur la plaĝoj la akvotemperaturo somere ŝanceliĝas inter 22 kaj 26 gradoj. La 352 metrojn alta monto *Meleghegy* (Varma Monto) — reganta la granitblokon sur la norda lagbordo — sub influo de varmega sunbrilo forte varmiĝas (dum la jaro la nombro de sunbrilaj horoj atingas 2000—2100) kaj la vento, kiu ĝenerale blovas el nord-okcidento, kuntrenas tiun varman aeron sur la lagon, al la banlokoj. La akvo estas meznombre ĉirkaŭ 2 metrojn profunda, sed ĉe la senkanejoj, la internaj pli grandaj akvospeguloj troviĝas profundecoj de 3—3,5 metroj.

Dank' al tiuj kondiĉoj la lago estas tre konvena por banado, feriado kaj por diversaj akvosportoj (remado, kajak-kanua sporto, velado).

La fiŝaro en la lago estas kaj kvante kaj kvalite bonega, do ekzistas favoraj premisoj por sporta fiŝhokado.

La montaro *Velencei-hegység* same kiel la nordaj partoj de la akvokolekta teritorio abundas je interesaj, variaj celpunktoj allogantaj la turistojn dum la tuta jaro. Tre frekventataj estas la historiaj memorindaĵoj el tempo de la liberecbatalo* — en *Pákozd, Sukoró* — same kiel la literaturhistoriaj memorlokoj: la loĝdomo de la hungara poeto Mihály *Vörösmarty* kune kun la muzeo en *Kápolnásnyék,* la naskiĝdomo de la hungara verkisto Géza *Gárdonyi* en *Agárd,* krome la folklordomo en *Sukoró.*

Pro bona atingebleco la lago, la refreŝigeja regiono ludas elstaran rolon en la fremdultrafiko, antaŭ ĉio en la enlanda turismo. Ĝi situas tiom proksime al *Székesfehérvár* kaj Budapeŝto, ke valoras veturi tien eĉ por duontago. La hodiaŭa homo ofte fuĝas la bruojn de la urbo serĉante senzorgiĝon, ripozon. La refreŝigeja regiono ĉe la lago *Velencei-tó* kun ĝiaj akvo, ebenaĵo, montara regiono, strangaj rokformiĝoj, la flaŭro kaj faŭno de la lago ege taŭgas por banado, sporta fiŝhokado, turismo, akvosportoj, alivorte — por refreŝiĝo, aktiva ripozo.

Sekve de grandiozaj pejzaĝaranĝaj kaj hidroteknikaj laboroj plenumitaj dum la lasta jardeko, unuavice konsiderinde granda parto de la suda lagbordo moderniĝis — parte el la prastato, parte el neglektiteco —, tamen konserviĝis la trankvileco de la 4 kvadratkilometrojn granda birdorezervejo sur la okcidenta flanko de la lago, kiu estas naturprotekta teritorio.

Se iu hodiaŭ ĉirkaŭrigardas desur la novaj plaĝoj de *Agárd,* vidas antaŭ si vastan luliĝantan akvokampon, dum la ondoj ruliĝantaj al ĝi batadas-rompiĝas ĉe prikonstruita bordlinio. Ĉe *Agárd, Gárdony, Velence,* anstataŭ kanejo, nun ondadas akvo laŭ la lagbordo, kaj fore, en la lago daŭrigas laboron la dragŝipoj forigantaj el pluaj lagopartoj la molan sedimenton, la ŝlimon flosantan kaj aluvian, saturitan de organikaj materioj ekstermantaj la superkreskintajn akvoherbojn por fari pli kaj pli novajn bordsekciojn taŭgaj por banado, refreŝiĝo. Malantaŭ la moderne konstruitaj ŝirmiloj videble pligrandiĝas la terenoj, reniveligitaj pere de ellevita lagoŝlimo, herbokovritaj areoj, parkoj, kie oni jam povas konstrui novajn moleojn, albordejojn, plaĝojn, boatejojn, fiŝhokistajn bivakojn, ripozdomojn, gastejojn, restoraciojn.

Celo de la ĝis nun plenumitaj kaj planitaj laboroj estas: igi la lagon taŭga por akcepti kiel eble plej multe da ripozgastoj. Tiuj laboroj intense progresas, ĉar laŭ la perspektiva evoluiga programo oni devas kal-

*Dum la jaroj 1848—49.



Velboat-haveno ĉe Agárd

kuli sezontage je ĉ. 120 miloj da gastoj krom la konstanta loĝantaro de la apudbordaj loĝlokoj.

Estigo kaj funkciado de la Administracia Komitato de Velencei-tó

La plijunigo kaj retrovo de *Velencei-tó* maturiĝis sekve de kreskantaj bezonoj je refreŝiĝo, sportado kaj turismo.

Por ke la evoluigo de la lago kaj ties ĉirkaŭaĵo respondu al la postulaĵoj, oni devis antaŭ ĉio krei la necesajn organizajn kondiĉojn. Tiel estiĝis en 1958 la *Administracia Komitato de Velencei-tó.*

Komence la esenca tasko de la Komitato estis pripensite formuli la farendaĵojn, indiki la vicordon de la farendaj laboroj kaj tion, kiel ili interrilatas. La celoj de evoluigado devis esti formitaj tiel, ke ili povus longtempe kontentigi la sociajn bezonojn.

Kiel unua tasko la Komitato konsideris la kompensadon de plurjardeka malzorgemo, la estigon de kondiĉoj por laŭplana, akordigita evoluo.

En la unua periodo de sia funkciado la Komitato — pritaksinte la taskojn kaj enviciginte ilin laŭ vidpunktoj de urĝeĉo — koncentris sian agadon je solvo de la plej urĝaj problemoj en la kadro de la ekzistantaj teknikо-ekonomiaj eblecoj. Ekiris la lagoreguligo, bordaranĝado, konstruado de bazaj komunumaj instalaĵoj, vojoj kaj trotuaroj; pliboniĝis la publika lumigado, evoluis la komerco, la hotelindustrio, konstruiĝis albordejoj por ŝipoj kaj boatoj, akvosport-celaj establaĵoj. Plaĝoj estis modernigitaj kaj plivastigitaj. Paralele kun la efektivigo, direktado kaj harmoniigo de la grandmezuraj laboroj la Administracia Komitato prilaboris projekton por regiona aranĝado kaj evoluigo de la refreŝigeja ĉirkaŭaĵo de la lago; tiu projekto ampleksis la tutan refreŝigejan regionon, nome la administrajn teritoriojn de la vilaĝoj kaj loĝlokoj: *Gárdony, Velence, Kápolnásnyék, Nadap, Sukoró, Pákozd, Pázmánd, Lovasberény, Zámoly, Pátka.* La registaro ankaŭ ekatentis pri la unuavice enlanda fremdultrafika signifo de la regiono, en 1969 ĝi pritraktis la pretigitan aranĝad-projekton kaj poste aprobis ĝin. Samtempe — inter aliaj — la registaro ordonis, cele de laŭplana efektivigo, ellabori surbaze de la projekto regionan programon por la evoluigo de *Velencei-tó* kaj ties ĉirkaŭaĵo, detale determinantan la laŭetapan tempodividon, manieron kaj elspezefikojn de efektivigo de la fiksitaj celoj.

La monumento ĉe Pákozd

La rezolucio okazigis decidajn ŝangojn: pretiĝis la perspektiva kompleksa plano kaj la programo de evoluigo de *Velencei-tó*, kiujn — post adekvataj akordigoj, ellaboro de investad- kaj financkondiĉoj — la registaro aprobis la 19-an de januaro 1971. La cirkonspekte kompilita, teknike-ekonomie motivita kompleksa programo servas kiel unueca kadro por perspektiva evoluigo de refreŝigeja regiono kaj determinas la ĉefajn celojn de la evoluigo, fiksas direkton por la estonta transformiĝo. La programo antaŭvidas efektivigon dum 4 aŭ 5 mezetapaj planperiodoj. Celo de la programo estas garantii kulturitajn vivkondiĉojn, sanan, agrablan ripozon, refreŝiĝon, sporteblecojn, libertemp-pasigon samtempe por la konstanta loĝantaro de la apudbordaj loĝlokoj, kies nombro en perspektivo atingos pr. 32 mil, krome por 60—70 mil somerumantoj dum la somera sezono kaj por 40—50 mil gastoj pasigantaj tie la semajnfinojn.

Kiel bazo por tiu plurdirekta evoluigo servas tiuj grandmezuraj hidroteknikaj laboraĵoj, kiuj komenciĝis en la sesdekaj jaroj, nome: akvonivelreguligo, konstruado de bordmuroj kaj komunumaj instalaĵoj. Ĉi lasta havas grandegan signifon, ĉar la laboranta homo dum la libertempo volas ĝui ne nur la belecon de la naturo, sed sur sia ripozloko li postulas ankaŭ kulturite garantiitan komforton.

Parolante pri akvomastrumadaj laboroj ni devas akcenti iliajn bazecan karakteron, ĉar ne plenuminte ilin la plua evoluigo ne estus ebla. Bone tio speguliĝas en la menciita registara rezolucio, kiu — inter aliaj — preskribas la sekvajn:



Interesaj formiĝaĵoj en la montaro Velencei-hegység: la tiel nomataj ŝanceliĝantaj ŝtonoj super la vilaĝo Sukoro

Por la evoluigo de refreŝigejaj teritorioj oni devas unuavice solvi jenajn taskojn:

a) por teni la akvosurfacon de Velencei-tó proksimume je konstanta nivelo oni devas akceli la finkonstruadon de la jam komencita akvorezervujo ĉe Zámoly por 4 milionoj m³ da akvo kaj konstrui la projektitan akvorezervujon ĉe Pátka por 11 milionoj m³ da akvo, krome pliigi la akvotralaskapablon de la kanalo Dinnyés—Kajtor;

b) reguligo de la lagbordo — escepte la bordon kaj ŝirmstrion de la naturprotekta teritorio — kune kun ekstermado de ĉebordaj, konstruado de bordprotektaj verkoj kaj reniveligo de la terenoj malantaŭ la bordŝirmiloj;

c) konservado de la biologia ekvilibro de la lagakvo pere de zorgado pri sistema plenumo de diversaj laboroj en la lago (sedimentforigo, ekstermado de akvoherboj, pretigo de senkanejoj por movigi la akvon ktp.);

d) provizado de la refreŝigejaj terenoj per sana trinkakvo pere de kondukado de somere superfluaj akvoj el la Danub-borda akvodistribuejo de Sukerfabriko Ercsi al la teritorio de la regiono kaj pere de konstruado de regiona trinkakvo-distribuejo;

e) konstruado de regiona kloakakvo-kanalaro por forkonduki la poluakvojn el la refreŝigejaj areoj situantaj sur la suda lagbordo — norde de la ŝoseo No. 70 — kaj el la nordaj terenoj pere de konstruado de ronda kanalreto kaj biologia poluakvo-purigejo.

Kun ĝojo oni povas konstati, ke le celoj indikitaj en la menciita registara rezolucio — dank' al sperta, sindona laboro — tempoproporcie realiĝis. Sekve de la ekfunkciigo de akvorezervujoj ĉe *Zámoly* kaj *Pátka* solviĝis la problemo de akvonivel-stabiligado kaj tio samtempe kontribuis al konservado kaj plibonigo de kvalito de la lagakvo. Kuŝejdragadaj kaj bordaranĝadaj laboroj ankaŭ akcelis la ŝirmadon de la akvokvalito. El troviĝinta en la lago pr. 8 milionoj m³ da

mola ŝlimo la dragmaŝinoj ĝis nun levis preskaŭ 3 milionojn m³ kaj per tiu ŝlimamaso oni sukcesis reniveligi pli ol 150 hektarojn da reakirita tereno, kio havas grandan signifon. Antaŭ la reniveligitaj terenoj ĝis nun estas konstruita ĉ. 10 kilometrojn longa bordmuro, unuavice ĉe la plaĝoj, kie la pliprofundigita kuŝejo de la lago certigas pli bonajn banadeblecojn ol antaŭe.

La ĝis nun plenumitaj akvonivel- kaj kuŝej-reguligaj laboroj, la bordokonstruado, ekstermado de kanejoj kaj akvoherboj viglige efikis je la refreŝigeja regiono. Prezentiĝis ebleco lokigi pluajn grandajn amasojn da baniĝantoj kaj somerumantoj, modernigi malnovajn plaĝojn, konstrui novajn akvosportejojn. Sekve de plilarĝigo de plaĝoj la entenspaco, ekzemple, kreskis per plua dekmilo, do la banlokoj sur la suda lagbordo povas jam akepti samtempe pli ol dudek mil plaĝantojn. Sur la ekstera bordsekcio ĉe *Agárd* estas jam preta la 800 metrojn longa Park-Strando, en kies ok vestiĝbudejoj povas trovi lokon entute ses mil plaĝantoj. Ĉe *Agárd* estas inaŭgurita la nova akvosportbazo de *Velencei-tó*, kiu entenas gimnastikejon, ekzercbasenon por naĝado kaj remado, etajn sportejojn, klubdomon kaj estas jam preta ankaŭ la sporthotelo kun plena komforto.

La moderna akvosport-bazo servas — krom la konkursantoj kaj edukatoj de la Akvosportlernejo de *Velencei-tó* — ankaŭ la korpkulturon de infanoj frekventantaj la cirkaŭlagajn ĝeneralajn lernejojn. Tiel krom avangardaj velboatistaj kluboj trovis hejmon sur la lago ankaŭ sekcioj por remboatistoj kaj kanuo-kajakistoj.

Dank' al la grandmezura bordaranĝado oni povas prikonstrui ankaŭ la ĝis nun neglektitan nordan bordon. En la 4-a kvinjarplano sur la bordsekcio ĉe *Velence* komenciĝis la konstruado de junulara refreŝiga kaj turisma centro, plaĝo kaj provizadcentro por aŭtistoj, internacimezura konkursejo por remboatoj kaj kanuokajakoj. La baza kampadejo de la junulara refreŝiga kaj turisma centro estis malfermita somere de 1974 kaj nuntempe — grandparte en lignodomoj — 400 junuloj povas tie agrable somerumi. La kampadejo estas plilarĝigata kaj en perspektivo ĝi estos taŭga akcepti samtempe kvin mil junulojn, certigi por ili provizadon.

En harmonio kun la ĝis nun efektivigitaj akvoaranĝadlaboroj laŭplane plenumiĝas ankaŭ la programo de konstruado de komunumaj instalaĵoj. Pere de akvodistribuejo ekfunkciigita antaŭ 4 jaroj kaj ties 173 kilometrojn longa akvoduktaro ebligis alkonduki sanan trinkakvon ĝis *Gárdony, Agárd, Velence, Nadap, Sukoró.*

Kiel ĝojigan fakton oni povas konstati, ke ankaŭ la poluakvo-purigaj kaj kloakakvo-forkondukaj laboroj progresas laŭplane.

Dum la lastaj jaroj konsiderinde pliboniĝis ankaŭ la trafiko de la refreŝigeja teritorio. En *Velence* jam estas preta la ponto supervoja kaj la subvoja piedira posejo sub la ŝoseo No. 70 kuniganta la okcidentan refreŝigejan areon de *Agárd* kun la lagbordo. En *Gárdony* oni konstruis trotuarojn, aŭtoparkejojn, sur la norda bordo la vilaĝo *Sukoró* ricevis novan ĉefvojon.

Esperante venkon

En kadro de la evoluiga programo la longeco de lokaj vojoj havantaj solidan pavimon kreskis de 34 km je 99 km kaj la amplekso de pavimitaj trotuaroj atingas 128 000 m².

Laŭetape progresas la evoluigo de elektroenergioreto kaj ekiris laboroj koneksaj kun la provizado de la loĝantaro per gaso kondukata en tuboj.

Skema resumado de la indikoj spegulantaj la ĝisnunan efektivigon de planoj, kiuj celas evoluigon de la lago *Velencei-tó* — rajtigas nin konstati: la celoj de la evoluiga programo en praktiko pruviĝis ĝustaj. La bone pripensita konsidero servis kiel solida bazo por organizita efektivigo de multaj taskoj.

Medioprotektado de Velencei-tó

Krom la konstrulaboroj celantaj evoluigon de la lago kaj ties ĉirkaŭaĵo, kompetentaj organoj — helpe de socia bazo — dediĉas grandan atenton ankaŭ al solvo de taskoj koneksaj kun medioprotektado de tiu regiono, konsiderante, ke ili devas esti solvotaj komplekse. En la vico de la taskoj sendube estas preferota la akvomedio-protektado, unuavice la lagoreguligo, la plijunigo de la lago, kio devas esti certigota pere de intervenoj etendiĝantaj sur la tutan akvokolektan teritorion kaj malhelpantaj diversajn malpurigajn efektojn. Sed almenaŭ kun sama zorgemo oni devas klopo-

di pri grundo-ŝirmado, haltigo de erozio, pri aerpureco kaj antaŭdeturno de nocoj pro bruo. Solvenda estas ankaŭ la lokigo de hejmomastrumadaj malpuraĵoj kaj industriaj defalaĵoj. Sekve de specifa karaktero de la regiono apartan taskon prezentas la preventado de pejzaĝdetruo, plivastigo de verdaj terenoj kaj la ŝirmado de vivaĵoj. La akvo-medioprotektado kaj la lagoreguligo efektiviĝas laŭplane, nome laŭ la direktivoj indikitaj en la „Generala plano por bordo- kaj kuŝejaranĝado de *lago Velencei-tó*." Surbaze de scienca esplorado kaj de la ĝis nun akiritaj spertoj la akvokvaliton de la akvofluoj enfluantaj en *Velencei-tó* — antaŭ ĉio tiun de la rivereto *Császárpatak* — same kiel de la akvorezervujoj ĉe *Pátka* kaj *Zámoly* danĝerigas unuavice la agrokulturaj kaj parte la komunumaj polucioj, devenantaj el la koncernaj loĝlokoj. Kontraŭ ili la priakvaj organoj devas ellabori aranĝad-planon kaj organizi la efektivigon. Similmaniere oni devas lukti — rilate la tutan akvokolektan teritorion — kontraŭ poluciaj efikoj fare de diversaj kemiaĵoj devenantaj el intensaj agrokulturaj terenoj kaj el industriecaj animalbredejoj. En la apudlagaj loĝlokoj la daŭrigo de forkondukado de poluakvoj industriaj kaj komunumaj efike servas ŝirmadon de akvokvalito de la lago samtempe plibonigas la komunuman provizadon de la loĝantaro, kaj konstanta, kaj somerumanta.

Por malhelpi la ŝlimiĝon de la lago suŝ la plej akvoriĉa rivereto *Császár-patak* oni estigos sedimentkaptilon; similaj instalaĵoj estas konstruotaj ankaŭ sur la riveretoj *Csontréti-patak* kaj *Bágyon-patak*. Pluan taskon prezentas la malpliigo resp. malhelpo de erozio, la aranĝado kaj reguligo de la kuŝejoj de pli-malpli grandaj akvofluoj nutrantaj la lagon. Tiujn laborojn kompletigos la laŭborda arboplantado kaj forstizado, estigo de ŝirmaj arbarstrioj, krome la racia elekto resp. reguligo de agrokulturaj branĉoj kaj kultivadmaniero sur la koncernaj terenoj.

La arbarplantado (ŝirmcela forstizado, estigo de parkarbaroj, arboplantado en internaj areoj, estigo de parkoj, arboreto) antaŭvidita en la programo pri evoluigo de *Velencei-tó* kaj ties ĉirkaŭaĵo bone simbolas, ke samtempe kun ĝenerala medioprotektado estas atingeblaj ankaŭ favoraj fremdultrafikaj, refreŝigaj, turismaj kaj ne lastavice — ekonomiaj rezultoj. Dank' al la pli grandaj verdaj terenoj pliboniĝas ankaŭ la aerkvalito.

Kiel potenciala danĝerfonto prezentiĝas en niaj tagoj la estiĝo kaj akumuliĝo de uzinaj (industrio, industriigita agrokulturo) kaj komunumaj defalaĵoj, hejmaj kaj ĝardenaj malpuraĵoj en la dense loĝataj distriktoj, pro tio gravan taskon prezentas la difino de oportunaj malpuraĵdeponejoj kaj iliaj manipulado, kiu devas respondi al la postulaĵoj de regionŝirmado.

Boat-haveno de la akvosportejo ĉe Agárd



Por realigi tiujn celadojn oni bezonas — krom helpo de konsilantaraj kaj sociaj organoj — ankaŭ la aktivan kunlaboron de la loĝantaro en la refreŝigeja aero.

El vidpunkto de pejzaĝprotektado oni devis reguli ankaŭ la ŝtonminadon en la montaro sur la norda lagbordo. Pere de raciigo de mineksplu atado, ties pograda translokigo kaj moderna rekultivado estos certigebla la forigo de cikatroj desur la fizionomio de la refreŝigeja regiono, la restarigo kaj konservado de naturbelaĵoj same kiel la malkovro de verdaj areoj.

Pluaj ideoj, farendaĵoj celantaj evoluigon de Velencei-tó

Konsidere de grandmezuraj kaj kontinuaj laboroj deciditaj en la evoluiga programo kaj celantaj konstruadon de komunumaj instalaĵoj, teritorio-preparadon, ĝis 1980, la entenspaco por somerumantoj kreskos per 16 mil. Tiucele estas konstruotaj unuavice refreŝigaj, edukaj kaj turismaj centroj, kolektivaj ripozdomoj funkciantaj dum la tuta jaro, estos instigata la „blokigita areamastrumado." La elformigo de valoraj apudbordaj terenoj kiel publika spaco havas la celon ebligi ripozadon por kiel eble plej multaj homoj. La pretigitaj — en pluraj variantoj — kaj rekomenditaj tipoprojektoj de entreprenaj refreŝigaj-edukaj kaj turismaj centroj taŭgas ne nur por somera feriado, semajnfina ekskursado, sed — vintre — ankaŭ por entreprena instruado, organizado de fakaj perfektigaj kursoj, do ili estos uzeblaj tutjare. Jam estas konstruataj tiaj entreprenaj refreŝigaj-edukaj centroj. Krom tio prezentiĝos ebleco konstrui ankaŭ privatajn ripozdomojn sur la suda kaj okcidenta refreŝigeja tereno de *Agárd* kaj sur la norda bordo, por kio oni devas aĉeti rajton de fruktuzo.

En *Gárdony* estas konstruitaj du moteloj, kun boatejoj, por entute 128 gastoj. Estas daŭrigata la konstruado de la Junulara Refreŝiga kaj Turisma Centro ĉe *Velence*. Sur ties propra plaĝo povos trovi lokon 4 mil personoj, estas konstruotaj komercaj unuoj, restoracioj, sportejoj.

En la planoj estas antaŭvidita plivastigo de la kampadejo ĉe *Agárd*, ekipado de Touring-Hotelo por vintra uzado, konstruado de plaĝo por aŭtistoj kaj kampadejo ĉe Velence, elformado de ekskluziva entreprena fishokista bazo ĉe *Dinnyés*, kiu en ĝia fina konstruadstadio estos hejtebla kaj taŭgos eĉ vintre akcepti mil gastojn. Ĝi havos ankaŭ la necesajn kompletigajn konstruaĵojn.

Ekiros laŭplana preparigo de la granda vilaĝo *Gárdony* je funkciado — indikita en la registara rezolucio — kiel refreŝigeja urbo. Konforme al tio elformiĝos moderna centro, kie estas konstruota nova loĝkvartalo konsistanta el pluretaĝaj loĝdomoj, sur kies teretaĝo situos vendejoj, priservad-unuoj, — komenciĝos la konstruado de novaj partia kaj magistrata domoj. Ĉi tie estas konstruotaj ankaŭ magazeno por industriaj artikloj, regiona muzeo kaj kulturaj establaĵoj.

Estas daŭrigataj la laboroj koneksaj kun bordmurkonstruado, kuŝejdragado, ekstermado de kanejoj kaj akvoherboj. Ĉe *Agárd* estas konstruata insulo „*Cserepes*" kaj ankaŭ ĉe *Velence* oni konstruos similan artefaritan insulon. Estas solvota la problemo pri forkondukado de precipitaĵaj akvoj. Estas plivastigota la trink-

akvo-provizado: oni konstruos akvoduktospinon sur la lagbordo kaj pere de plua konstruado de la distribua duktaro la akvo estas kondukota al *Dinnyés, Agárd*-Sudo, *Pákozd*. Ekiris laboroj celantaj trinkakvo-provizadon por *Csákvár, Pázmánd, Pettend* el akvoduktoj. Estas plivastigata ankaŭ la kloakakvo-forkondukada sistemo, la poluakvo-purigado, kunlige kun agrokultura utiligo. Estas modernigata kaj plivastigata la komunikado (informa servo), la apudlaga regiono estas alligota al la senpera interurba telefonsistemo. Komenciĝos laboroj koneksaj kun enŝalto de la vilaĝcentro de *Gárdony*, de la grandaj refreŝigejoj kaj grandaj konsumantoj en *Agárd* kaj *Velence* en la naturgasprovizadon helpe de gastubaro. Estas plivastigota kaj modernigota la publika lumigado — precipe en la havenoj kaj ĉe ŝipalbordejoj, sur la plaĝoj, estas evoluigota la elektro-reto kaj konstruota la necesa por ties efektivigo 20 kilovolta ĉefkondukilo. Estas daŭrigata la vojkonstruado kaj modernigo. Ĉe *Velence* baldaŭ finiĝos la 2-a kaj 3-a sekcioj de la vojo *Panorama*, estas konstruota la norda ĉefa kolekta vojo, oni modernigos la vojojn inter *Kápolnásnyék—Lovasberény* kaj *Kápolnásnyék—Pákozd*. Ĉe Agárd inter la du plaĝoj estiĝos granda parkejo por aŭtomobiloj, baldaŭ finiĝos la konstruado de subtrak-pasejo ĉe la fervojstacio. Estas daŭrigataj kaj parkizado, kaj arboplantado, sur la nordaj altaĵetoj oni komencos estigi arboreton. Tra la parkarbaroj oni estigos vojojn kaj ĉiuspecajn konstruaĵojn — lardrostadejojn, benkojn, elvidejojn, gimnastikejojn, kontraŭpluvajn rifuĝejojn — por ekskursantoj kaj turistoj.

Grandan signifon havas la — jam sistema — enlokigo de alvusoj kiel rekompletigo de la fiŝaro, tiucele estas konstruota aparta konstanta fiŝmastrumada bazo. Konsiderindajn sumojn foruzas la esplorlaboroj koneksaj kun medioprotektado akvokvalit-ŝirmado, biologio kaj naturprotektado. Tiuj laboroj igas la kompleksajn regionprotektajn disponojn pli motivitaj.

Estas daŭrigataj la laboroj koneksaj kun preparado de pluaj terenoj, ĉefe sur la ĝis nun preskaŭ neuzita norda bordo. La plej signifa inter ili estas la terenpreparado en la zono *Nadap—Sukoró—Pákozd*, kie estiĝos trafika parko kun 3500 metrojn longa provovojo por aŭtomobiloj provizota per la necesaj sekurigaj instalaĵoj. Krom tio estas eble estigi tie trejnadan aŭtovojon, instruan centron por estontaj ŝoforoj, oni povas eĉ estigi aŭtokurejon, do tiu loko — dank' al la bela ĉirkaŭaĵo — certe fariĝos ŝatata ekskursejo por aŭtistoj. Tie oni povos aranĝi spektaklajn lertec- kaj rapidec-provadojn, konkursojn, tiel ĝi estos unika aŭtista establaĵo en nia lando.

La entenspaco de la plaĝoj kreskos per $17^1/_2$ mil. Ĉe *Gárdony* estas konstruita nova plaĝo kun aleo, modernaj vestiĝbudetoj, manĝejoj. Sur la ekzistantaj plaĝoj la konstruaĵojn oni igas taŭgaj por vintra feriado (vintra sportumado), estas plenumataj modernigaj laboroj, apud pli profundaj — sekve de dragado — akvosekcioj estiĝas infanbasenoj. Kiel noveca solvo estas konstruota plaĝo por aŭtistoj kaj motelo por 6 mil gastoj, parkejo por 2 mil aŭtomobiloj kaj necesaj provizad-unuoj — je oportuna atingebleco, precipe por aŭtistoj venantaj el Budapeŝto.

Antaŭ nelonge la laga regiono pliriĉiĝis per nova



La lago Velencei-tó hodiaŭ estas jam paradizo de velboatistoj kaj kajakistoj

naturtrezoro: proksime de *Gárdony*, en la valo *Bikavölgy* oni trovis termalan akvon. La esplor-borado — laŭ rapidaj ekzamenaj indikoj — el profundo de 900 metroj minute levas po 700 litrojn da 50-grada mineralakvo. Tio ebligas konstrui parte kovritan varmakvan strandon kun tri aŭ kvar basenoj, kapablan akcepti en fina stadio pr. 5 mil gastojn, estigi restarigan (rehabilitan) medicinan (terapian) centron, krome — konsiderante la eblecojn, kiujn donos la plua borado — paralele oni povos eble utiligi la termalan akvon kiel termoenergion en agrokulturo (plastfolia kultivado).

La senĉese kreskanta frekventateco de la refreŝigeja regiono — eĉ jam la nunaj vizitantoj — postulas rapidan evoluigon de komerca, trafika kaj hotelindustria retoj. Tiucele en la apudlagaj loĝlokoj estas malfermotaj novaj manĝaĵ-, legom- kaj fruktvendejoj, en *Velence* Supermarketo. En *Agárd* estas konstruotaj moderna aĉeta centro kaj foirejo, krom tio, anstataŭ la ekzistanta *Kantegmenta* ĉardo hotelindustria kombinato. Samloke estas plivastigotaj la Supermarketo, la restoracio *Csutora* kaj sur la nova plaĝo oni konstruos bufedon. En *Gárdony* estiĝos magazeno por industriaj artikloj kaj aĉeta centro. La priservado kompletiĝas per vestaĵpuriga salono *Patyolat* en *Gárdony*, *Gelka*-riparservejo, Fremdultrafika Oficejo kaj vojaĝagentejo IBUSZ. Ĉe *Velence* apud la plaĝo por aŭtistoj, proksime de benzinstacio ÁFOR estiĝos aŭtistprovizada centro kun servico AFIT, kies kapacito atingos jare 60 mil horojn.

El la planitaj kulturaj kaj distraj establaĵoj menciindaj estas la refreŝigeja klubo en *Agárd*, la naturscienca kaj regiona muzeo, kulturdomo en *Gárdony*, la folklordomo en *Velence*.

Por plibonigi la sanitaran prizorgadon en *Gárdony*, estas konstruataj kuracista konsultejo kaj apoteko.

En *Velence* estas konstruata moderna ĝenerala lernejo konsistanta el 16 lernoĉambroj, gimnastikejo kaj naĝbaseno. Estas plivastigata la sportkombinato en *Agárd*, estiĝos nova boatejo kaj sportrestejo. Sur la norda bordo estas konstruotaj la centraj establaĵoj de la remboata kaj kanuo-kajaka konkurslinio.

Do la evoluigo estas plu daŭrigata. La fina celo estas krei en la refreŝigeja regiono de *Velencei-tó* kulturitajn kondiĉojn kaj eblecojn por sanrestariga sinbanado kaj utiligo de la plilongiĝanta libertempo.

Tr. Klára *Velősy*

Lingve revizis: Alfonso *Pechán*

Antologieto de ŝercoj tra la hungara historio

Ne estas hazardo, ke la suba antologieto komenciĝas ĝuste en la epoko de la dualismo, t. e. de la Aŭstra—Hungara Monarkio. Angloj, francoj kaj rusoj rakontas anekdotojn aŭ „historietojn": mi konas neniun alian lingvon krom la hungara kaj germana (Kompreneble troviĝas ankaŭ kelkaj aliaj. — Noto de la redaktoro.), en kiu la ekvivalento de la vorto *ŝerco* aperus en la vortaro kun la sama signifo, kiel en tiuj du lingvoj. Tiu ĉi sagaca ĝenro elkreskis ĉi tie, en la imperiestra kaj reĝa monarkio, kaj de ĉi tie ĝi penetris en la caran Rusion kaj en Germanion de imperiestro Vilhelmo.

Kial ĝuste en tiu ĉi monarkio? Tial, ĉar estis ĝuste la Habsburgoj, kiuj kreis la multoblan, hierarkie strukturitan subpremadon fare de la ŝtato, kaj la multgradan subordigitecon en la sorto de la homoj. Sufiĉas mencii la nomon de Franz *Kafka*, kiu estante germanlingva verkisto, vivis en la ĉeĥa Prago kiel judo sub la regado de Vieno, tio estas jam la tria potenco de la subpremiteco. Tiu ĉi cirkonstanco estas ŝlosilo ne nur al la verkaro de Kafka, sed ankaŭ al tiu ĉi sola temprezista produkto de la Aŭstra—Hungara Monarkio: al la Mez-Eŭropa *ŝerco*.

La ŝerco ebligas, ke ĉiu individuo kaj komunumo „dum momento — eĉ se nur por momento — per unu salto liberiĝu el sia kaĝo aŭ el la kaĝo de la socio", kiu kaĝo alimaniere montriĝas ne-trapenetrebla. Ĝi estas do speco de „mikrorevolucio" aŭ abrupta ekfulmo, kiel tiu de magnezio: se la ŝerco estas bona, ĝi donas al la medio prilumon, kiu povas fariĝi socikritiko.

Ĝi ne havas aŭtoron. Ĝi kreiĝas ie, flugas de buŝo al buŝo, cizeliĝas kaj fine fariĝas konciza, kiel epigramo. Kaj kiel ĝi trafas la celon en centro! En nia lando ĉiu ŝerco respegulas iun „situacion". Nur en tiu ĉi situacio la ŝerco trafas, kaj se la situacio ŝanĝiĝis, ĝi perdis sian validecon. Sufiĉas al ni aŭdi la ŝercojn de hungaro vivanta en eksterlando, por scii, en kiu jaro li forlasis la landon. Tiu ĉi suba kolekto fakte estas cent jaroj de la hungara historio — rakontita per ŝercoj.

István *Örkény*

AŬSTRA—HUNGARA MONARKIO (1867—1918)

Francisko Jozefo la Unua vizitas azilon de surdmutuloj en Vieno. La direktoro faksperte klarigas al li:

— Ĉi tie, Majesta Moŝto, troviĝas kune la tuta Monarkio. Tiu ĉi knabo estas italo el Trentino, tiu alia el Stirio. La malaltulo, tie, estas dalmato, kaj tiu ĉi hungaro. Sed troviĝas ĉi tie ankaŭ poloj, ĉeĥoj, rumanoj, kroatoj . . .

— Kaj ĉu ili vivas en harmonio?

— Kompreneble, Majesta Moŝto. Ili ja estas surdmutuloj.

* * *

Serĝento demandas rekruton:

— Diru, kial ni devas oferi nian vivon por Lia Reĝo Moŝto Francisko Jozefo la Unua?

— Prava demando, sinjoro serĝento! Kial?

* * *

Francisko Jozefo vizitas laboratorion.

— Kio ĝi estas? — li demandas montrante vitran ujon.

La kemiisto klinas sin preskaŭ ĝis la planko kaj diras:

— En tiu ĉi ujo, hidrogeno



kaj oksigeno havas la altan honoron unuiĝi antaŭ la okuloj de Via Reĝa Moŝto, por formi kombinaĵon.

UNUA MONDMILITO (1914—1918)

La imperiestro, kiu estis konata pri tio, ke li ne ŝatis la heredonton de la trono, preparis sin por enlitiĝi, kiam oni portis al li la informon, ke la kronprinco Francisko Ferdinando estis atence murdita en Sarajevo. Francisko Jozefo legis la telegramon, metis ĝin sur la noktotablon kaj oscedis:

— Dio mia, kiel trista mi estos morgaŭ!

* * *

Soldato fosas batalŝirmejon. La truo jam estas profunda du metrojn, sed li plu fosas. La serĝento krias al li:

— He! Tiel vi ne povos vidi la malamikajn soldatojn!

— Ĉu mi diris, ke mi volas vidi ilin?

* * *

Kovács revenas de la fronto tute sana kaj senvunda. Oni demandas lin, kiel li sukcesis forlasi la soldatservon.

— Tute simple — li respondas. — Mi anoncis min por ekzameniĝi, donis cent kronojn al la sanitara serĝento, kaj li sendis min hejmen.

— Kaj via amiko, Szabó?

— Ĉu tiu *malkuraĝulo?* Li plu rampas surgenue en la tranĉeoj.

* * *

Francisko Jozefo el sia mortlito turnas sin al la heredonto de la trono:

— Mi avertas vin pri du gravaj aferoj, filo mia. La unua estas la telefono: ĝi estas la sola kreaĵo de Dio, kiu enpense ne kontraŭdiras al vi, kiam vi parolas al ĝi. La alia estas la noktovazo ĉi tie sub la lito: ĝi estas la sola aĵo en nia monarkio, en kiun imperiestro Vilhelmo ne ŝovas la nazon.

TERORO, KRIZO KAJ KONSOLIDIĜO (1920—1930)

— Kial vi vangofrapis min?

— Tio ne koncernas vin.

— Bone, sed kiu vi estas?

— Tio ne koncernas vin.

— Bone. Do diru almenaŭ, kiu el miaj oreloj zumas?

* * *

— Hieraŭ iu policisto tute senkaŭze pugnobatis min sur la ĉefa avenuo.

— Ho! Pro tio oni povos enkarcerigi vin eĉ por tuta jaro!

* * *

Opozicia parlamentano interparolas kun ĉefministro *Bethlen:*

— La plej grava malbono estas, Ekscelenca Moŝto, ke vi ne konas la suferojn de la malriĉuloj!

— Ĉu ni? Ja ni mem kaŭzas ilin!

TUTMONDA KRIZO, ANEKSO DE AŬSTRIO (1930—1940)

— Se la krizo daŭros plu, ni bezonos almozpeti.

— Bone, sed de kiu?

* * *

— Kiom da tempo bezonas Hitler por okupi post Aŭstrio ankaŭ Hungarion?

— Per milito unu semajnon. Sed pace tutan monaton...

— Kial tiom multe?

— Evidente tiom da tempo nepre necesos por diri ĉiujn tostojn.

DUA MONDMILITO (1939-1945)

La adjutanto raportas al Hitler:

— *Mein Führer,* la italoj faris militdeklaron.

— Ĉu? — respondas Hitler trankvile. — Sendu unu korpuson al la itala limo.

— Sed ili deklaris militon ne

kontraŭ ni, sed kontraŭ la francoj.

— Rapide! — ordonas Hitler. — Tuj sendu dek korpusojn al Italio.

* * *

Policisto longe observas telefonfoston ĉe stratangulo. Fine li aliras ĝin kaj severe diras:

— Ha, mi kaptis vin! Dum horoj vi faras nenion alian ol transsendi informojn!

* * *

— Ĉu ankaŭ en Hungario ofte oni mencias pri la *Führer*? — demandas germano.

— Jes, pli ofte tamen pri lia patrino...

* * *

La maljuna Blau ne kapablas plu elteni, kaj decidas mortigi sin. Li elektas la manieron, kiu ŝajnas esti la plej certa. Li renkontas sur la strato unu SS-soldaton, ŝtele iras malantaŭ lin kaj piedbatas lian postaĵon. La soldato turnas sin, observas la maljunuleton kun la flava stelo kaj fariĝas mortpala:

— Ĉio perdita! La Usonanoj albordiĝis...

* * *

En la vilaĝestrejo oni pritraktas konfidencaĵon: necesas malpermesi ĉiun novaĵon pri la proksimiĝo de la Soveta Armeo. Baldaŭ la vilaĝa pedelo iras al la strato kaj anoncas:

— La vilaĝestro informas, ke venas la rusoj, sed estas malpermesite paroli pri tio!

PERIODO DE LA KOALICIA REGADO (1945—1949)

Cigana violonisto iras malgaje sur la strato kaj renkontas sian kolegon.

— Kio okazis al vi? — demandas la alia.

— Mi venas de la Komisiono de Purigo. Oni malpermesis al mi plu ludi.

— Kial?

— Ĉar la prezidanto demandis min, ĉu mi ludis iam la faŝisman kanton *„Mi estas soldato de Miklós Horthy"*. Mi konfesis, ke jes.

— Sed diable, kial vi ne neis tion?

— Estis neeble. Mi ludis tiun kanton por li.

PERSONKULTO (1949—1956)

En karcera ĉelo sidas tri homoj.

— Kial vi estas ĉi tie?

— Ĉar mi parolis kontraŭ la ministro pri internaj aferoj. Kaj vi? — li demandas la alian.

— Mi parolis por li. Kaj vi? — li turnas sin al la tria.

— Mi estis la ministro pri internaj aferoj.

* * *

— Kion pentras realisma pentristo?

— Tion, kion li vidas.

— Kaj pentristo esprimisma?

— Tion, kion li sentas.

— Kaj kion pentras pentristo socialisma-realisma?

— Tion, kion li aŭdas.

* * *

— Fine de la Tria Kvinjara Plano ĉiu homo havos propran televidaparaton kaj propran aviadilon — diras politika agitanto.

— Por kio utilas propra aviadilo? — iu demandas.

— Nu, vidu, ekzemple vi informiĝos per la televido, ke en Nyiregyháza oni povas aĉeti gumbotojn, do vi nur prenos vian aviadilon, kaj post duonhoro vi jam staros en la vico.

* * *

La maljuna Kraus estas obstina disvastiganto de falsaj informoj. Kiam oni kondukas lin triafoje al la policejo, la policistoj decidas timigi lin. Ili kondukas lin al la korto, vindas al li la okulojn, kaj pafas al li sen kuglo. La maljunulo eliras kun tremantaj kruroj al la strato. Tie li renkontas konaton kaj mallaŭte diras al li:

— Mi malkaŝas al vi ion, sinjoro Szabó, sed tenu ĝin konfidence: ili jam eĉ kuglojn ne havas!

1956—1975

Hundo nomata *Floki* ŝteliras el la lando. Aŭstra polichundo pridemandas lin.

— Ĉu oni batis vin?

— Ne.

— Ĉu vi malsatis?

— Ne.

— Do, pro kio vi foriris?

— Ĉar mi volas boji.

* * *

Junulo, ŝtele foririnta el Hungario, sendas leteron al sia amiko: „Mi ŝatas la emociojn, la aventurplenan vivon. Pro tio mi foriris."

La amiko respondas: „Ankaŭ mi ŝatas tiujn. Pro tio mi restis hejme."

* * *

La maljuna Spitz mortas kaj alvenas en la ĉielo. Sankta Petro petas, ke li konigu sian aŭtobiografion.

— Volonte. Mi estis komizo en la Aŭstra—Hungara Monar-

kio. Poste mi fariĝis memstara komercisto en la Respubliko Ĉeĥoslovakio. Post certa tempo mi vivis kiel „juda persono" en la Hungara Reĝlando, kaj fine mi estis laboristo de kooperativo en Sovetio.

— Diable! — diras surprizite Sankta Petro. — Vi travagis la tutan mondon!

— Mi?! Dum mia tuta vivo mi ne eliris el la urbo *Mukaĉevo!*

* * *

Kovács vojaĝas la unuan fojon al Okcidento, per turista pasporto. Parizo, kabaredo, striptizo. Koloraj reflektoroj, dolĉa muziko, virino incite malvestas sin. Abrupte Kovács kraĉas. Venas polico, oni monpunas kaj forigas lin.

Post la reveno al Budapeŝto la edzino demandas:

— Ĉu vi pensis pri mi en Parizo?

— Jes, karulino, unufoje. Sed tio kostis al mi cent frankojn.

SEPDEKAJ JAROJ

— Kiel vi fartas, sinjorino Formikino?

— Dankon. Oni altigis mian salajron, kaj nun ĝi pli-malpli sufiĉas por mi. Kaj vi, sinjorino Cikadino?

— Nu, iele-iome, duone-malbone... Fine jam estas preta nia ripozdomo en la montaro. Kaj nun, aĉetinte novan aŭtomobilon, kun la edzo ni faros ekskurseton tra Francio dum la vintro, kaj poste ni ripozos iomete en Nico.

— Diru, ĉu vi iros ankaŭ al Parizo?

— Jes, ni trapasos ĝin.

— Ĉu mi povas peti de vi etan servon?

— Kompreneble, diru nur.

— Tretu anstataŭ mi la tombon de La Fontaine.

El la hungara: *V. B.*

Eminenta perfektiga lernolibro



„Paŝoj al plena posedo" por unua fojo aperis ĝuste antaŭ 10 jaroj, en septembro 1968-a. Ĝia aŭtoro, la mondkonata esperantisto, akademiano William Auld, per tiu ĉi malgranda „Progresiga Legolibro de Esperanto kun Lingvaj Ekzercoj" deziris helpi al tiuj esperantistoj kiuj entreprenas pli profundan lernadon de la lingvo, sed Auld eble ne pensis, ke lia legolibro havos 3 eldonojn kaj estos unu el la plej ŝatataj legaĵoj en Esperantujo.

Tiu ĉi difino estas nek hazarda, nek troigita. El sia riĉa sperto kaj praktiko kiel aktiva esperantisto Auld konstatis, ke multaj de niaj samideanoj estas kaj eterne restas komencantoj en la lingvo. La kaŭzojn por tio ĉiuj ordinare serĉas en manko de emo por persista kaj pli profunda lernado, sed ne ĉiam tio estas la sola kaŭzo. Ofte la ekzistantaj lernolibroj de Esperanto estas tre elementaraj kaj rapide enuigas la lernantojn, aŭ ekzistas kelkaj tre komplikaj Esperanto-gramatikoj, plej ofte nacilingvaj, kiuj ne taŭgas por la kapabloj de ĉiuj lernantoj.

Auld trovis veran racian vojon. Lia perfektiga lernolibro ne nur kontentigas la interesojn de la vasta legantaro, sed signife riĉigas iliajn lingvajn konojn.

La fundamenta celo de *„Paŝo al plena posedo"* estas, ke la lernanto „liberiĝu kiel eble lej komplete el la katenoj de la nacilingva pensado."

Kiamaniere Auld sukcesas realigi tiun celon? Unue per novaj vortoj, kies signifon li klarigas Esperantlingve. Li supozas ke la lernantoj en la komenco de la legado havas vortprovizon de ĉ. 700 vortoj kaj li donas vortaran difinon de ankoraŭ 1682 novaj vortoj. La variaj legaĵoj kaptas la intereson de la legantoj, kaj ili nur tiam konsultas la vortaron en la libro, kiam la signifo de iu vorto ne estas tre klara el la kunteksto aŭ estas tute nekonata. Tiel la lernado de la novaj vortoj fariĝas flua kaj natura.

Auld elektis ne nur interesajn, sed diverstemajn kaj diversĝenrajn legaĵojn: poemojn, rakontojn, publicistikajn kaj sciencajn artikolojn. Ne sufiĉas la mencio nur de unu aŭ du temoj de la legaĵoj en la libro, ĉar la bildo kaj impreso restos neplenaj. Alia grava signifo de tiu elektado estas ke per la variaj legaĵoj Auld nature donas kaj klarigas la novajn vortojn, apartenantajn al diversaj stiloj: literatura, publicistika, scienca..., La elektitaj legaĵoj apartenas al la plej bonstilaj verkoj en Esperanto kaj tiamaniere la aŭtoro korektas ankaŭ la stilajn malglataĵojn de la legantoj.

Se la celo de la libro estas — pensi Esperante, ĝia devizo, kiel mem difinas la aŭtoro, estas: „Esperanton oni plej bone lernas per studo de bona Esperanto".

La gramatikaj ekzercoj estas 176, sed pere de la metodo „demandoj kaj respondoj" la legantoj preskaŭ ne sentas, ke ili faras grandajn paŝojn en la ekposedo de la gramatiko. Kelkaj gravaj gramatikaj reguloj estas koncize klarigitaj.

Eble la plej necesa paŝo por la novaj esperantistoj estas la tralego de la lastaj paĝoj, el kiuj ili ekscios pri la eldonitaj Esperanto-ĉefverkoj kaj la adresoj de la landaj Esperanto-organizaĵoj.

Mi tralegis tiun libron antaŭ kelkaj jaroj. Poste kaj nun mi ofte trafoliumas ĝin kaj kun plezuro legas diversajn legaĵojn. Eble post ĉiu nova tralego mi faras novajn paŝojn al la posedo de nia lingvo.

Georgi *Mihalkov*

PANNONIA









PANNONIA Eksterkomerca Entrepreno de UZINOJ CSEPEL

1062 Budapest, VI., Bajza u. 26.
Telegramadreso: PANEXPORT Budapest
Telefono: 228-850. Teletajpilo: 225128 PANEX—H,
Poŝta adreso: 1394 Budapest, P. f. 354

EKSPORTO:

•

Fajnmetalurgiaj duonfabrikaĵoj por telekomunikada tekniko, elektra kaj elektrona industrioj

•

Inkandeskaj elektrodoj kaj kablokerno por pretigo de elektrodoj de temperature regulita fandofitingo[1]

•

Ŝtaltuboj
Ŝtalboteloj por oksigeno ktp.
Bicikloj por sinjoroj, sinjorinoj kaj infanoj
Biciklo-konsistaĵoj

•

Maŝinoj por la konfekcioindustrio
— Elektraj tajladmaŝinoj
— Kudromaŝinoj
— Gladmaŝinoj
— Gladilaro
Specialaj maŝinoj kaj iliaj subtipoj

•

Maŝinoj por lavejoj kaj por la teksaĵpuriga industrio

•

Kompletaj konfekcio-instalaĵoj por teksaĵ kaj led-konfekcio-industrioj

•

Kompletaj lavejoj kaj vestpurigejoj

•

Transportinstalaĵoj por konfekcio-fabrikoj kaj lavejoj

•

Prilabormaŝinoj por tuboj kaj stangoj
— Pintigmaŝinoj
— Tub-rektigaj, fleksaj maŝinoj
— Longigaŭtomatoj por tuboj kaj stangoj

•

Spiraltub-veldejoj

•

Maŝinoj kaj uzinoj por produktado de senfugaj tuboj

•

Maŝinoj kaj uzinoj por ŝtalbotel-fabrikado

•

Maŝinoj kaj uzinoj por pretigo de arklum-veld-elektrodoj

•

Instalaĵoj kaj uzinoj por pretigi biciklo-konstruerojn, kaj por muntadi biciklojn

•

Konigo de Know-how[2] kaj teknologio, instrukcioj por fakpersonaro

[1] **fitingo** (PIV): kuniga interorgano (mufo, krano) de tubokondukiloj (por brulgaso, akvo); interĝustiga tubo vaporkondukaj tuboj.

[2] **Know-how:** fabrikad-teknologio, »scii kiel«

Tr. Alfonso *Pechan*

Esceptoj en Esperanto

En la regula planlingvo Esperanto tamen ekzistas pluraj esceptoj el la absoluta reguleco. Ili ekzistas en la lingvo jam dekomence, parte enkondukitaj de la aŭtoro mem, parte kontrabanditaj en la internacian lingvon el etnaj lingvoj, kaj sankciitaj de la lingvonormigaj fundamentaj verkoj aŭ de pli poste aperintaj duonoficialaj verkoj kiel la Plena Gramatiko, Plena Vortaro kaj Plena Ilustrita Vortaro. Unuj el ĉi tiuj esceptoj estas senĝenaj aŭ eĉ certagrade por-celaj, nuancigaj kaj do riĉigaj por la lingvo, aliaj estas ĝenaj, ĉar ili estas dusencaj, ja havas eĉ du kontraŭajn sencojn, kaj povas kaŭzi eĉ gravan miskomprenon kaj konfuzon. Ni observu iujn el ambaŭ kategorioj.

Inter la unuaj, senĝenaj, tolerindaj kaj siacele utilaj, ni konsideru tiajn inverssencajn vortojn, por kiuj Zamenhof mem por la malaj nocioj lasis apartajn vortojn, kiel ekz. *komenci — fini*, aŭ enkondukis *apud* la mal-formoj kiel *maldolĉa, malĝojigi, malsukcesi, malutili* radikvortojn kaj kreis duopojn: *dolĉa amara, ĝojigi-aflikti, stulta-sprita, sukcesi-fiaski, utili-noci, ofta-rara ŝpari-disipi ktp.* Ĉe pluaj aŭtoroj de gravaj vortaroj ekz. Plena Vortaro, Parnasa Gvidlibro, Plena Ilustrita Vortaro, oni trovas pluajn tiajn sinonimojn por plej ofte uzataj nocioj, kiel ekz. *kurta* (mallonga), *dura* (malmola, *tarda* (malfrua), *softa* (mallaŭta), *frida* (malvarma), *lontana* (malproksima), *poke* (malmulte) k.s. Uzo de tiuj vortoj, jam preskaŭ neprave nomataj neologismoj, ĉar ili en la lingvo hejmas plejparte 40—50 jarojn, estas pravigebla per tri motivoj: 1/ Ili liveras sinonimojn aŭ preskaŭsinonimojn por tre ofte uzataj komunlingvaj nocioj, same kiel tiajn posedas la naciaj lingvoj, kaj ebligas adekvate malplatige redoni tradukojn de riĉesprimaj beletraj verkoj, 2/ ili liveras pli mallongajn, plejparte dusilabajn vortojn tiel necesajn ĉe tradukoj kaj verkado de poeziaj kaj muzikaj tekstoj, 3/ ili prezentas ankaŭ novajn rimvortojn. Ili estis komence konsideataj kiel poeziaj fakesprimoj, sed multaj el ili transiris pro sento de bezono jam en la komunuzan lingvon (*kurtondoj ks.*). Sed ili neniam forkondamnu aŭ elpuŝu la utilegan prefikson „mal"! Ja male, poeto *darfu* uzi surprizcele kaj freŝefike eĉ nekutimaĵojn: *malfini, malkomenci, malrara, malfrida* ks.

Alia tia escepto estas la pseŭdoadverba uzo de prepozicioj *ĉirkaŭ* kaj *ĝis* en jenaj frazoj: „La soldatoj ricevis *ĝis* plenan sakon da terpomoj kaj du panojn". „Al la infanoj oni donis *ĉirkaŭ* kilogramon da pomoj". „Ĉiu ricevis *ĝis* cent kronojn". Oni ricevis *ĉirkaŭ* tian sumon, kian oni bezonis."

Ĉie ĉi tie havas la prepozicioj *ĉirkaŭ* kaj *ĝis* funkcion de adverbo en senco „preskaŭ, proksimume", kaj devus propre teksti ĉirkaŭe, ĝise. Ĉi tiuj esceptoj estas neniel ĝenaj, samkiel iuj esceptoj ĉe la absoluta fonetika prononcado. Ni konas ja la asimiliĝon de voĉaj kaj senvoĉaj konsonantoj, la aperon de duonaŭdebla „j" en hiatoj, kiam al la vokalo „i" najbaras alia vokalo. Ankaŭ la regulo, ke en Esperanto ne ekzistas duoblaj konsonantoj en la vortradikoj havas esceptojn: „Ĉu venos *Anna?*" „Ĉu estos ana kunveno?" „Ŝi ne estas E*mm*a." „Ŝi ne estas e*m*a." Nian klubon vizitis finno." „La fino estas proksima." „Gal*l*oj estis praloĝantoj de Francujo." „Lia ga*l*o estas malsana". K. s. Ĉi tie ni distingas du malsamajn nociojn kaj per skribo, kaj per kurtigo de la akcentita vokalo laŭ la regulo, ke la akcentita vokalo antaŭ du konsonantoj (el kiuj la dua ne estas likvido r aŭ l), estas kurta.

Ni povus citi ankoraŭ kelkajn neĝenajn kaj ne miskomprenigajn esceptojn. Sed nun ni observu la duan kategorion de esceptoj mallogikaj, ĝenaj.

Sur la unuan lokon mi metus la du kontraŭajn sencojn ĉe la negado de la verbo „devi". Laŭ PV kaj PIV estas sankciita la mallogika kaj escepta senco, laŭ kiu „ne devas" signifas „devas ne..." Tiel „Mi ne devas labori" signifu: estas al mi *malpermesite* labori. Bone. Sed laŭ la regulo: „ne" staras senpere antaŭ la vorto, kiun trafas la negado, multaj komprenas logike „mi ne devas..." kiel „mi ne havas devon...", analoge kiel: „mi ne povas" — „mi ne havas povon", „ne emas" — „ne havas emon", „ne bezonas" — „ne havas bezonon" ktp. Jes, malgraŭ, ke tiun escepton enkondukis Zamenhof kaj ke ĝin citas la PIV. Uzi por „ne devi" en la logika senco „ne havi devon" Zamenhof preferis „ne bezonas". Sed estas neniel neglektebla diferenco inter „ne devi" kaj „ne bezoni". Bezoni — havi bezonon, fontas iel el la subjekto, propra sento. Devi — havi devon, povas veni kaj el la subjekto, kaj, ja eĉ pli, el ekstera faktoro. Uzado de „ ne devi" estas do defendebla en ambaŭ sencoj, kaj tiel ĝi estas fakte ankaŭ uzata en literaturo kaj en lernolibroj. Por eviti tiun dusencecon ja eĉ kontraŭsencecon, oni proponis jam antaŭ jardekoj verbon „darfi", kies nea formo „ne darfas" anstataŭu la arkaikiĝontan formon „ne devi" en la Zamenhofa senco „ne havi permesitecon". La verbon darfi uzadas pluraj bonaj aŭtoroj, enhavas ĝis ankaŭ ĉiuj ĉeĥaj kaj slovakaj E-vortaroj el la lastaj jardekoj. Sed ial ĝin konsideris nebezona la PV kaj PIV. Tie listita „lici" estas taŭga nur por uzo sensubjekta. Por eviti la kontraŭsencecon de la du uzoj de „ne devi" prezentiĝas pluraj manieroj:

Mi devas ne trinki alkoholaĵojn, aŭ

Mi ne rajtas trinki alkoholaĵojn, (tamen tio signifas, ke mi ne havas rajton!) aŭ

Ne licas, ke mi trinku alkoholaĵojn, aŭ, kaj plej trafe

Mi ne darfas trinki alkoholaĵojn.

Do jen kvar variantoj por esprimi sin precize kaj unusence. Elekto sufiĉa eĉ por la kontraŭuloj de la taŭga verbo „darfi". Espereble en la reeldonoj de la PIV aŭ ĝia suplemento aperos ankaŭ tiaj *uzataj* vortoj kiel darfi, burgo (mezepoka fortikigita) kastelo/,kaj kelkaj aliaj.

Ĝena estas ankaŭ uzado de prepozicio „trans" kun lokŝanĝo foje kun akuzativo, foje sen akuzativo. Ekz. en Zamenhofaj frazoj: „Pensoj iras trans limo sen pago kaj timo". „La hirundo flugis trans la riveron..." Ĉar se „prepozicio *trans* montras lokon aŭ spacon kuŝantan pli malproksime ol, kaj iel dividitan disde la objekto, kiun ĝi enkondukas", ĉe lokŝanĝo devus sekvi okuzativo, por evitigi miskomprenon. Tiel ĝi estas ankaŭ nuntempe preskaŭ senescepte uzata. Por senakuzativa uzo ĉe lokŝanĝo ofte uzeblas prepozicio „tra": „Pensoj iras tra limo...", iam alia prepozicio: ŝnuro pendis super la korto. Eĉ kiam la lokŝanĝo estas nur kvazaŭa, taŭgas akuzativo: „Knabino saltadis trans la svingŝnuron".

Ni vidas, ke en tiaj ĉi miskomprenigaj esceptoj, eĉ se defendeblaj kiel Zamenhofaj kaj Fundamentaj, ni elektu kaj plu uzadu la pli logikan, unusencan, nemiskompreneblan kaj pli ĝustan manieron. La alia fariĝos ne eraro, sed poiome arkaikaĵo.

Jiří *Kořinek*



En nia nuna krucenigmo ni citas la titolon de la verkoj de fama hungara verkisto Gyula Krúdy. Ensendi sufiĉas nur la horizontalajn 4. kaj 70., perspektive la vertikalajn 1. kaj 35. Inter la solvintoj ni lotumos libropremiojn.

HORIZONTALE: 1. Kvarpieda dombesto (R) 4. *Titolo de libro de Krúdy* 13. Moviĝas por ĉeesti 14. Islama piulo 15. Estas senmakula 16. Monejo (R) 18. Allogaj 19. Ŝategata persono (-o) 20. Malfortika (-a) 22. Kelta kantisto (-o) 23. Ŝian paron 24. Ĉi-tempe 25. Motoro de korpo (R) 27. Tabelvorto 28. Tiel nomata (mll.) 29. Deklari bona (-i) 31. Movigi objekton (-i) 33. Samloke (mll.) 34. Sinuso de komplementa angulo (R) 36. Granda akvo (R) 38. Moviĝi reen (-i) 39. Araba lando 41. Likvaĵo de la vivo (R) 42. Malgranda 44. Agi laŭrilate kun alia homo 46. Kutima mallongigo de hungara forinto 48. Sengepatra (-a) 50. Impresi la flarsenson 51. Kemiaj simboloj de sulfuro kaj jodo 52. Duonunco (R) 54. Pasteca manĝaĵo (R) 56. Konfuza sonaro (R) 57. Aŭtomobiloj el Malto, Urugvajo kaj Aŭstrio. 58. Profitrezuta (R) 60. Forŝovi malpuraĵon. 62. Bonodora materialo (R) 63. Naskigi (-i) 65. Rondforma parto de ĉaro (R) 66. Helena duondiino. 67. Ion pensas ia 69. Pli bone malfrue ol... (Z) 70. *Titolo de alia libro de Krúdy.*

VERTIKALE: *1. Titolo de libro de Krúdy* 2. Aluna tero (R) 3. Despoto (R) 4. Speco de kambio (R) 5 Aro da homoj devenantaj de la sama prapatro (R) 6. Verbofinaĵo de preterito 8. Jean Forge 9. Agi (-i) 10. Golfo sur la Ruĝa Maro 11. Sentenda tranoktado (R) 12. Malĝuste diris 16. Honora pastra titolo (R) 17. Elpremita likvaĵo el fruktoj (R) 20. Rapidegis 21. Miksaĵo de polvo kaj akvo (R) 24. Aŭtomobiloj el Norvegujo, Portugalujo kaj Svedujo 26. Versfinaĵo (R) 29. Ĉefa arterio 30. Kontoro 32. Kunkoleti fojnon 34. Tabelvorto 35. *La ĉefa kaj plej fama figuro de Krúdy.* 37. RAI. 40. Eligi flareblajn sed nevideblajn korpopecojn 43. Parto de kurbo (R). 45. URU. 46. Grava parto de aviadilo kaj birdo (-o). 47. ... festeno (ĉe primitivuloj, kiam ili esceptokaze manĝas sian totemon). 49. Kreskaĵo kun renformaj grajnoj. (R). 51. Ekstera parto de objekto (R) 53. Mono en Jugoslavio 55. Veturilo (R) 57. Aktorino esprimanta sin nur per mienoj kaj gestoj. 59. Sekvu tekston per voĉo! 62. En ekspluatejo de karbo. 64. Hinda princo. 66. Kovras la teron vintre 68. Reen: Roma monero el bronzo (R). 69. Vi kaj mi.

Imre *Szabó*

TRI NOVAJ LIBROJ!

LA KNABOJ DE PAULO-STRATO estas cefverko de la tutmonda junulara literaturo, kiu unu fojon — antau kvardek jaroj — jam rikoltis meritita sukceson en Esperantujo. La jus aperinta dua eldono ebligas al vi legi en Esperanto tiun ci intereskaptan kaj samtempe emocian romanon, kiun dumtempe famigis ankau sukcesa filmo.

ĴUS APERIS!

Tiu ci jubilea antologio de BELARTAJ KONKURSOJ enhavas pli ol 50 verkojn de aro da autoroj el preskau 30 landoj: la plej sukcesajn premiitajn verkojn de la lastaj 25 jaroj. Ne maltrafu la eblon havi fidindan bildon pri tiu periodo de la esperanta literaturo!

18 cm., 208 p. Prezo: 13,80 ned. gld. Mendu ĉe UEA aŭ rekte ĉe Hungara Esperanto-Asocio!

TAŬGEGA LEGAĴO POR KURSANOJ!

La popularan romantikan romanon de Mór Jókai nepre ekŝatos ĉiuj esperantistaj legantoj pere de tiu ĉi bildrakonto, kiu estis farita laŭ la klasika, plurfoje filmita verko. Preskaŭ 400 desegnajoj kaj facile kompreneblaj komentarioj vin helpas konatigi kun la aventuroj de la herooj. Aperte menciindas la plaĉa eksterajo de la libro: la kovrilon ornamas kolorfoto.

24 cm., 64 p. Prezo: 6,— ned. gld. Mendu ĉe UEA aŭ rekte ĉe Hungara Esperanto-Asocio.

La ĝusta solvo de nia krucenigmo aperinta en la 1-a numero de Hungara Vivo estas:

„Ho Vi, Vizio mia! Mia individuo!
Ho Vi, Genio mia, ke tian mi imagas."

Per lotumado libropremion gajnis: Kris *Long* (Britio); Adolf *Staňura* (Ĉeĥoslovakio) kaj Tibor *Papp* (Hungario). Gratulon al ili!

LETERKESTO

Renato Corsetti, Roma: ĉar vi bezonas — en kadro de Centro de Dokumentado Esperantista — dekon da ekz-oj de nia nro 1/1978. por informcele utiligi ilin, ni ekspedata al ĉiuj E-revuoj kaj LA-j, funkciuloj do ponistro pri edukado, la reagoj de sidikatan je TUCEG, helpas la movadon ankaŭ eksterlande se utiligataj; la hungara E-movado agas ja konscie kaj solidare por internaciaj celoj.

N. Lentaigne, F, Montpellier: post apero de nia respondo en nro 2/78, okazis jam grava ŝanĝo. Per nova asekuroformo por veturantoj, *ĉiaj kostoj* pro urĝaj medicina helpo, transportado de malsanulo k. s. estas pagataj — ankaŭ en nesocialismaj landoj — de asekura kompanio hungara. Do okaze pro akcidento aŭ malsaniĝo la invitanto tute ne devas elspezi por sia hungara gasto.

Oskar Stolberg, Leipzig: via laŭda opinio pri nro 1/78 kongruas kun tiu de s-ro Corsetti (vd. supre); HV estas ekspedata al ĉiuj E-revuoj kaj LA-j funkciuloj do povas niajn agadojn ekkoni kaj provi similajn. PV klarigas *„rigardi"* kiel direkti vidon ien, sekve ŝajnas akceptinde, ke „ne nur rigardi, sed ankaŭ *vidi"* havas pli da senco, ol inverse. Pri hungara historio kolekti la artikolojn ankaŭ por resuma klubvespero, estas plaĉa ideo.

T. S. Lejbovič, SU. Lvov: pravas via averto, jen la kompletigo: Tyburcjusz (elp. tiburcjuŝ), Széchenyi (séčénji), vilaĝo Drávaszabolcs (dráva-sabolč); sur p. 8. ni jam skribis: lajoŝ koŝut. Ni aldonu: Giunio, sur p. 33. (ĝunjo), Vásárhelyi, p. 27. (vaŝarheji), Felsőberecki, p. 29. (felŝőberec-ki), kaj: **karoj polinski, ministro.** Bv. legi ankaŭ en nro 6/77: *„Kiel prononci hungarajn nomojn?"*

Observanto, Budapeŝto: iom rigid-gramatikeca ŝajnas viaj rimarkoj, sed ni senkondiĉe dankas vian severan atenton! Tamen akceptu por E-o pli da libereco ĉe frazformulado, ĉe gramatikaj rilatoj: *traduki* vere eblas *el* iu lingvo *al* alia; estas jura afero (sed ne problemo), ke iu estas ekz. justicministro *de* Aŭstralio; persona pronomo *foje* estas forlasebla, se je kelkaj vortoj antaŭe jam ĝi staris; oni lernas ion ofte *laŭ* (propra aŭ gepatra) *volo,* ankaŭ laŭplaĉe, laŭdezire; *aliĝi klubon,* kvankam ne tro kutima, pravigeblas, vd. en hungarlingva Gramatiko de Kalocsay sur p. 221. pri prepoziciaj prefiksoj. Necesas pli da *toleremo* (p. 18. en 1/78), ĉar estas „la homo (kiu)... atentigas, .. (sed ne nur atentigas" en la eseo, certe ne por komencantoj facila legaĵo.

B. Zbigniew, PL, Gliwice: en E-o aperis jam de Petőfi la poezia rakonto „Johano la Brava", kiu estis denove publikita en la volumo „Libero kaj amo", elektitaj poemoj de Petőfi, tradukitaj de *Kaloĉsay.* De nia granda E-a poeto aperis „Streĉita kordo" kaj ĵus la „Izolo", originalaj poemoj; „Eterna bukedo", „Tragedio de l' Homo" de Madách (madáč), „Hungara Antologio" (plejparte), „La morto de la ĉielarko" de E. Ady (granda parto) tradukitaj majstre de li.

Harijs Skuja, SU—Latvio, Riga: koran dankon pro via artikolo, en literatura gazeto *Karogs,* pri Literatura Mondo kaj kultura agado de HEA. Ni alte taksas la impetan tajdon de nia movado en Latvio, viajn literaturajn verkadojn kaj eldonadon.

Johano Hamvai kaj edzino, Auckland, Nov-Zelando: kvankam ni evitas publiki laŭdojn pri HV, la viajn, ĉar venintajn el la antipodo, ni dankas tie ĉi. Ni faros ĉion eblan por fari nian revuon eminenta, kaj se *laŭ vi* ĝi estas jam la plej bona E-a gazeto, certe ni paŝis antaŭen; ni strebas per HV publiki kiel eble *internacian* revuon. Vi estas kore atendata en via naskiĝurbo!

Kris Long, A, Bracknell, Berkshire: okaze de la krucenigmo, vi informas nin, ke Sándor *Weöres* (vöröŝ) havas elstaran tradukanton al la angla kaj skota lingvoj: *Edwin Morgan.* — Dankon!

Korespondi deziras

Ingénierino Natali *Brik* (30) ktm, interŝanĝi diskojn, E-insignojn, E-librojn, bk, pm, glumarkojn. SU—344 007 *Rostov-Don,* Temernlokaja 68—11. Geedziĝo ebla. — Inĝ. *Gogoladze* Irakli (42) komputer-fakulo, ktm, pĉt. SU—380 059 *Tbilisi,* Digomskij massiv, III. Kv. 10 korp. (40. kv. Gruzio. — *Bertók* Zoltán (25) instr. de mat-kemio, ktm. pĉt. H—8100 *Várpalota,* Kremnica 1. — Stasys *Raulynaitis* (23) elektromekanisto, ktm. pri turismo, etnografio, muziko, kol. E-insignojn, urbo-flagojn. Litova SSR, Jurbarko g. *Skirsnemune,* SU. — Ĉeslavo *Zadzilko* (19) pĉt. PL—16-207, Kruglo 4, *Rozanistoko.* — Prezidanto de regiona E-klubo Vasilij *Grigorenko* (30) atendas viajn leterojn Esperante, aŭ ruse, ukraine, germane: SU—314 028, Ukrajna SSR, *Poltava,* Krasina 95. kv. 16. — *Ciganij* Alla, juna lernantino, kun eksterlandanoj, kol. bk, pm. SU—483 310, *Talgar—2,* urbo, Alma-atinskaja obl., ul. Mendelejeva 22. kv. 30.

Se vi volas korespondi kun e-istoj el Slovakio, vian anoncon aperigas *Esperantisto Slovaka,* monata organo de E-Asocio en Slovaka SR Adreso: red. E. V. *Tvarožek,* Hodžova 1939/6. CS—911 01 *Trenčín.* Bv. indiki fam. staton, aĝon, okupon, intereson, nomon kaj adreson reslitere. — Dirk *Essling* (15) ktm. pĉt., DDR—209 *Templin,* Am Birkenhain 7. Fach 1007.

HUNGARA VIVO

Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Responda redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Farkas-Tatár.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits** * Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H—1368 Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** * Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I. 215—96—162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 48,— al eksterlando krome Ft 9,60 por afranko. * Peranto al eksterlando: KULTURA, Budapest, P. O. B. 149. H—1389 Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,—Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. *78-7092 Somogy megyei Nyomda Responda gvidanto: Béla Farkas, direktoro. * **Indexszám: 25 377 ISSN 0018—7704.**

La kuracplantekstraktoj
de SZILAS
gardas la sanon —
pligrandigas la laborkapablon

Paprikaszesz

KAMOMILO
MENTO
PAPRIKO
HISOPO
SALVIO
TIMIANO

HARGUTOJ

Produktas:

SZILASMENTI MGTSZ

Illóolaj és Gyógynövény üzem

Kerepes H—2144



Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANGEBLA

en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental — Hotel Gellért

Konsumturist